

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2021. №2



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2021. №2 (308)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2021

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2021, №2 (308).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 5 июля 2021 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Antaŭ tridek jaroj	5
Intervjuo	6
Paweł Fischer-Kotowski. Ionel Oneț: Entuziasmo kaj bonvolemo ne sufiĉas.	
Intervjuo kun Ionel Oneț	7
Eventoj	11
Povilas Jegorovas. Litovia mozaiko	12
Peter Baláž. E@I: Nova oficejo, nova urbo, nova estonteco	14
SES 2021 denove virtuala	15
Han Xin, Xie Ruifeng. Ĉinaj esperantistoj vizitis la muzeon de Lusin	16
Przemysław Wierzbowski. Bjalistoko: Mardaj renkontiĝoj en Esperanto-Libraro	17
Renato Corsetti. Afişo por la Esperanto-Tago 2021	17
Reala Esperantio nur en Greziljono kaj KCE	18
Esperanto-kastelo Greziljono en julio kaj aŭgusto	18
Esperanto oficiale menciita en ALTE-laborprogramoj	19
Ĉeesta kurso en Liaoning	19
Unesko ĝojas pro 5 686 respondoj en Esperanto	20
Renato Corsetti. Por Esperanto en Eŭropa Unio	20
Virtuala Kongreso anstataŭ UK	21
Nitobe-Simpozio 2021	22
Nova retkurso: Lernu prelegi en dek simplaj paŝoj	23
NASK: Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto	24
Mireille Grosjean. Instruistoj kongresos virtuale ankaŭ en 2021	25
Povilas Jegorovas. BET denove okazos en Litovio!	26
Fernando Maia Jr. Redakta maratono Unesko 2021	27
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Funebraj notoj	28
Tribuno	29
Amri Wandel. Ĉu Israelo venkis la pandemion?: Malgraŭ la viruso kaj la virtualaj	
kunvenoj, denove kunvenas "homoj kun homoj"	30
11 vortoj el la kurso en Duolingo kiujn eble vi ne konas	36
TEJO pri la Monda Tago de Rifuĝintoj 2021	37
Mesaĝo de UEA okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj	38
Informi pri Esperanto en la festivalo Pol'and'rock	39
Fernando Maia Jr., Peter Baláž. Nova projekto de UEA: "Esperanto-Kvizo"	40
Lingvo	41
Věra Barandovská-Frank. Ĉu novas Lingua Franca Nova?	42

László Szilvási. Malgranda fina venko – kaj velko en Hungario53

Arkivo62

Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 202163
Aleksander Korĵenkov. Antaŭ cent jaroj66
Devjatin V. Historia kongreso67
La III-a Tutruslanda Kongreso Esperantista68
Bert Boon. Internacia Esperanto-Arkivo71

Kulturo73

Aleksandr Solĵenicyn. En la unua rondo: Romanfragmentoj (Tradukis el la rusa Aleksander Korĵenkov)74
Rusaj romanoj. La 20a jarcento 104
Ewa Grochowska. Ferioj ĉe la maro 105
Laure Patas d'Illiers. 18:03 107
Paulo Sérgio Viana. Viro laŭte parolanta al neniu 112
Wolfgang Kirschstein. Kaj la gajnanto estas..... 114
Floréal Martorell. Nova bitalbumo: MArta kaj JOmo kantas MAYOMA-n 118
Floréal Martorell. Kvin Jarcentoj: Nova albumeto de BaRok-Projekto 119
Floréal Martorell. Nova albumo de i.d.c.: vinila, K-diska kaj bita..... 119
Floréal Martorell. *Memorante Gondolandon*: Senpaga albumo de Korvaks 120
Floréal Martorell. *Esperanto Subgrunde 2*: Antaŭmenda kampanjo. 121
Paŭlo Moĵajevo. *Nenifar'*: iom monotona, sed nepre atentinda albumo (Recenzo: Guillaume Armide. *Nenifar'*) 122
Vinilkosmo lanĉis la bitan unuopaĵon *Mozaiko* de Kĵara..... 123
Przemysław Wierzbowski. Vigla eldonado en la naskiĝurbo de Zamenhof 124
Halina Gorecka. *Beletra Almanako*, 2021, №40 126
Literatura Foiro, 2021, №310 128
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. 500+ tagoj da seninterrompa informado ... 129
"Esperanto ligas homojn": Literatura Konkurso 2021..... 130
Ricevitaj gazetoj 130

Mozaiko 131

Stanislav Belov. Ridu kune ni! 132
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj 133
Perantoj de *La Ondo de Esperanto* 134
Reklamo 135

La somera (laŭ la nordhemisfera vidpunkto) eldono de *La Ondo* malfruis je kvin tagoj pro la enorma varmego, komplikinta la laboron en nia redakciejo. Sed nur je kelkaj paŝodekoj de nia domo, ĉe la fontana placeto apud la arta muzeo ĉi tiun varmegan ĝuis petolemaj infanoj (Foto: Halina Gorecka)

Antaŭ tridek jaroj

1991. Nun ni scias, ke ĝi estis jaro memorinda. Ĝuste en 1991 ĉesis ekzisti Sovetunio, komenciĝis militoj en la disfalanta Jugoslavio, kaj okazis la operaco “Ŝtormo en dezerto”. Tamen eble pli grava ol la militoj kaj (mal)aperoj de ŝtatoj estis tio, ke la 6an de aŭgusto 1991 la brita informadikisto Tim Berners-Lee kreis la retpaĝon `info.cern.ch`, kiu iĝis la komenco de la Tut-Tera Teksaĵo, sen kiu la nuna civilizacio ne estas imagebla.

Sed nia eta familio tiam vivis kvazaŭ en alia dimensio. Kvankam estante ankoraŭ je la ŝtata servo, ni komencis iom post iom prepari nin al nova vivo, antaŭsciante, ke la 91a estas nia lasta hobia jaro en Esperantujo, kaj ke necesas jam paralele eklabori per Esperanto profesie. Per enormaj fortostreĉoj ni sukcesis pretigi komputile nian unuan “veran” libron (*Sveda alumeto* de Ĉeĥov) kaj la unuan kajeron de *La Ondo de Esperanto* kun materialo ekkolektita antaŭ pli ol unu jaro.

Kaj la 23an de majo 1991, ekzakte je la 33a naskiĝdatreveno de la *Onda* redaktoro, ni kun Viktoro Kloĉkov, venis aviadile el Moskvo al Schiphol, de kie Osmo Buller kondukis nin al la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, kie ni disdonis al la oficistoj la freŝbakitan *Ondon* kaj tostis je la sano de la naskiĝtagulo kaj je la sukceso de l’ nova gazeto.

La interesa kaj fruktodona restado en Roterdamo kaj Antverpeno kuraĝigis nin kaj firmigis nian planon, sed reveninte al Sverdlovsko ni unue devis dediĉi niajn vesperojn kaj feriajn tagojn al la redaktado de la unua numero de *Ruslanda Esperantisto* kaj al la preparado de *Eŭropo-Azio* – la unua internacia renkontiĝo esperantista en Soveta Ruslando, organizita nur de esperantistoj mem, sen eksteraj kuratoroj (ASE, SSOD kaj aliaj oficialaj instancoj). La 1an de julio *Ruslanda Esperantisto* estis presita, kaj la 6an de julio ĝin ricevis ĉiu el la cent partoprenantoj de *Eŭropo-Azio*, inkluzive de Lee Chong-Yeong, estonta prezidanto de UEA.

En septembro Sverdlovsko rricevis sian malnovan nomon Jekaterinburgo, kaj en novembro ni unuafoje trovis nin en nia propra loĝejo kaj komencis la novan vivon de profesiaj esperantistoj. Sed el la 91a restis tradicio – la 23an de majo ni festas ne nur la naskiĝdaton de la *Onda* redaktoro, sed ankaŭ de la gazeto mem. Gazeto, kies 308an eldonon vi nun eklegas.

Agrablan legadon!



Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

Intervjuo



La *Ondo* kore gratulas al Ionel Oneț okaze de lia 65-jariĝo kaj deziras al li ĉion bonan kaj ĉian bonon! La supra foto pri Ionel aperis ankaŭ en *Făclia* – loka ĵurnalo de Kluĵo – kiu raportis pri la jubileo de sia iama urbano.

Ionel Oneț: Entuziasmo kaj bonvolemo ne sufiĉas

La 29an de majo 2021 65-jariĝis Ionel Oneț – rumano, aparte konata kiel la nuna libroservisto de UEA. En ĉi tiu rolo li laboras jam pli ol 19 jarojn, kio igas lin rekordulo. Lia aktivado ĉirkaŭ la Esperantaj libroj ne limiĝas al tio, li ankaŭ tradukas, verkas, bibliografias kaj eldonas. Nun la ĉefa projekto, kiu okupas lin, estas la granda rumana-Esperanta vortaro. Elkoran gratulon al Ionel!

Dum kiom da jaroj vi jam laboras en Esperantaj libroservoj?

Ekde februaro 1989. Tio signifas pli ol 32 jarojn, se mi ne eraras.

Kiel aspektas kutima labortago de libroservisto?

Kvankam ne ĉiam samas la ordo, laŭ kiu taskoj plenumiĝas, kutima labortago konsistas el, ĉefe, traktado de mendoj. Tiel simple! Nu, ne vere.

Legado de la alvenintaj retmesaĝoj estas la unua tasko de la tago. Tion sekvas ilia divido laŭ prioritatoj. Respondi la plej urĝajn mesaĝojn kaj informi la klientojn pri la eventuala neplenumeblo de iliaj mendoj estas la sekva paŝo. Post tio venas la traktado de la mendoj kaj pli malfrue en la tago la laŭebla trakto de aliaj taskoj (enskribi nove ricevitajn varojn kaj surbretigi ilin, trakti malpli urĝajn mesaĝojn kaj eventualajn poŝtaĝojn, sendi mendojn aŭ informpetojn al eldonantoj kaj tiom plu).

Kiam aldoniĝas al la stoko novaj varoj, necesas enskribi ilin kun ĉiuj iliaj detaloj en la inventaron kaj aldoni ilin al la listo de freŝaj eldonaĵoj en la reta katalogo de UEA (<https://katalogo.uea.org/index.php?st=novaj>), kaj al la koncerna rubriko en la revuo *Esperanto* de UEA.

Multaj konas vin ĉefe kiel libroserviston, sed vi estas ankaŭ aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj, eldonisto kaj tradukisto. Via vivo estas plena je libroj. Ĉu ĉiam estis tiel?

Nu, ĝenerale, jes. En mia frua infanaĝo legado estis ĉefa okupo. La aŭskultado de la radio estis reguligata, tiel ke ĉiu ano de la familio havu aliron al siaj plej ŝatataj radioprogramoj. Kiel infano mi estis, evidente, la lasta sur la prioritatliso. Pri televido ne eblas paroli en mia infana vivo – la unua televidilo aperis en la domo de miaj gepatroj, kiam mi jam estis for en la urbo.

Restis, do, legado. Libroj ĉiam allogis (kaj neniam ĉesis fari tion miakaze) min. La fakto ke de jardekoj mi vivas inter/kun/per libroj ne estis io planita. Tio venis same nature kiel la griziĝo de mia hararo.

Kiel vi trafis Esperanton? Kaj kiel la lingvo, la movado influis vian vivon – kiel mi komprenas, ne nur la profesion?

Kvankam mi estis aŭdinta pri Esperanto jam kiel adoleskanto, mia unua kontakto kun la lingvo okazis en 1981 (t. e. antaŭ 40 jaroj. Ĉu tio faras min “veterano”?). Post lego de kelkaj bazaj informoj (kiuj tiam ŝajnis al mi troigaj) pri la lingvo en iu krucvortenigma revuo, mi petis aldonajn informojn kaj materialojn de la tiama rumana Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko. La ricevitaj lernomaterialoj kaj periodaĵoj instigis min ekstudi la lingvon. La rapida sukceso stimulis min lerni pli. Ĉio posta venis nature. Ĉu indas mencii ke mi tute ne bedaŭras la “malŝparitajn” (dirus iuj) tempon, energion, monon?

La temo “kiel Esperanto influis vian vivon” en mia kazo postulus tutan artikolon. Ni lasu tion por alia okazo.



Ne estas multaj personoj, kiuj perlaboras sian panon per Esperanto. Aliflanke, tio ne estas premio, sed dediĉo. Vi decidis agordi vian vivon por servi al Esperanto. Ĉu vi ripetus la saman vojon kun viaj hodiaŭaj scio kaj sperto?

Al via “tio ne estas premio, sed dediĉo” eble aldonindas “kaj puno”. Kiam oni laboras por Esperanto, oni devas havi dikan haŭton. La batoj venas ne nur de ekstere (aparte, la moko de tiuj, kiuj – sen esti tuŝintaj ion ajn Esperantan – “scias” ke Esperanto estas io mortinta, ke tia projekto havas nenian ŝancon realiĝi, ke “neniu parolas tiun nefunkcikapablan lingvon”), sed ankaŭ de interne: abundo de “spertuloj”, kiuj neniam faris iun laboron, scias pli bone kiel plenumi tiun laboron.

Dirinte tion, mi respondu vian demandon: jes, mi sekvus la saman vojon. Eble, mi pli atentus ĝiajn malebenaĵojn, sed ignori ĝin mi ne povus.

Kiel oficisto de UEA kaj libroservisto vi spertas ĉiutage ke la nivelo de niaj libroj kaj agadoj ofte ne atingas la nivelon de similaj inicatoj ekster Esperantujo. Kiel oni povus profesiigi la movadon?

Grandan parton de la laboro farata ene de nia mondeto faras volontuloj. Tre (mi bedaŭras diri, tro) ofte ili estas pli entuziasmaj ol sciaj pri tio, kion ili faras. Evidente, volontula laboro estas kaj necesa kaj bonvena en movado, kiel la nia – ni ne havas malantaŭ ni ministeriojn pri financoj, kiuj verŝus milionojn en niajn projektojn por povi pagi verajn profesiulojn. Tamen la entuziasmo kaj la bonvolemo ne sufiĉas. Necesas ankaŭ konoj kaj spertoj. Tiujn oni ja devas akiri!

Ofte volontuloj aperas kaj, pro diversaj kialoj, malaperas kiel nuboj post pluvo. Bedaŭrinde, ne ĉiuj el ili komprenas, ke bonvolemo ne sufiĉas. Aliflanke, ne ĉiuj,

kiuj laboras kun volontuloj, komprenas ke tiuj ĉi ne estas sklavo, ke ili havas sian dignon, kiun oni devas respekti. Pro la aroganteco, memfiero kaj troa memfido de iu aŭ alia, ofte ni perdas kapablajn homojn, kiuj en la estonteco povus grave kontribui al nia movado. Sen nova sango (t. e. novaj kapabluloj kaj profesiuloj), ni – kiel tuto – ne povas profesiĝi. Kaj tio montriĝas en niaj produktaĵoj.

Mi esperas, ke mi ne malkaŝos sekreton, se mi diros, ke vi laboras nun pri granda rumana-Esperanta vortaro. Enorma tasko, kiun normale realigus teamo da homoj, en ĉi tiu okazo estas plenumata de solulo. Kiel aspektas tiu laboro? Kiom da tempo ĝi postulas?

Baldaŭ post mia esperantistiĝo, mi komencis traduki (kaj retrotraduki). Laŭ mi, (retro)tradukado estas unu el la plej bonaj (eĉ se malfacilaj) manieroj plialtigi sian lingvonivelon. Probable pli bona ol originala verkado.

Ekde de la komenco de mia Esperanta vivo, mi sentis la mankon de seriozaj Esperantaj vortaroj por la parolantoj de la rumana. Ĉar mankis la ŝanco, ke en la tiam Rumanio (temas pri la 1980aj jaroj) kompiliĝu tiaj vortaroj, mi komencis surslipigi vortojn por mia persona uzo. Dum pli ol 20 jaroj “mia” ĉambro en la gepatra domo estis ornamita de miaj sliparoj. Kiam eblis al mi reviziti Rumanion sendanĝere (post 1989), okaze de ĉiu vizito mi prenis kun mi al Usono kelkajn sliparojn, kies enskribaĵoj mi komencis enkomputiligi. Montriĝis ke la principoj, laŭ kiuj mi eklaboris, ne taŭgis. Do, frue de la nuna jarcento mi rekomencis laŭ pli rigoraj reguloj.

Nu, kompili dulingvan vortaron estas titana laboro. Oni devas sekvi la evoluon ne de unu lingvo, sed de du. Tio kreas evidentajn problemojn, aparte por iu, kiu ne vivas en la lingva etoso de unu el la lingvoj. Tamen kun espero kaj obstino oni antaŭeniras.

Kompili grandan vortaron, kiam oni havas devigan laboron panodonan, ne estas facile. La daŭro de tia entrepreno estas neantaŭvidebla, kaj laŭ la tempopaso montriĝas, ke ĉiujn limdatojn oni devas rekonsideri. En mia kazo “vortarista” laboro okazas aldone al mia profesia laboro kaj ja dependas de ĝi. En tagoj kiam laceco, deprimado, pigro, nervozeco regas, la aldona laboro perdas sian gravecon, kaj tiam okazas nenio rilate al tiu projekto. Se ĝi entute sukcesos, ĝi estos forpreninta kelkdek jarojn el mia vivo. Ĉu ĝi meritas la penon? Tion respondu aliaj... kaj ne nun.

Ĉu vi tenas kontakton kun la Esperanto-movado en Rumanio? Kiel statas la aferoj en via devenlando?

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Mondaj solvoj
por mondaj
problemoj

ESPERANTO
por monda
kunlaborado

ESPERANTO-TAGO
26.07.2021

Lernu **Esperanton**, la mondan lingvon
por kunlaborado kaj paco

www.lernu.net · <https://wikipedia.org/wiki/Esperanto> · www.esperanto.org

La 26an de julio la adeptoj de Lingvo Internacia diversmaniere festas la naskiĝdaton de Esperanto. Pro la koronviroza pandemio ĉi-jare apenaŭ okazos multaj festrenkontiĝoj kaj surstrataj agotagoj, sed oni zorgas pri konvenaj manieroj por inde informi pri nia festo en la reto.


Litovia mozaiko

Zamenhof-ekspozicio migras plu

Post la kvarantena paŭzo plu migras tra Litovio la ekspozicio pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof en Litovio. Intertempe ĝi okazis en la kulturcentro de Marijampolė, publika biblioteko de Vilkaviŝkis, publika biblioteko de Kalvarija. Ekde julio ĝi estos eksponata en la publika biblioteko de Kazlų Rūda.

Okaze de la ekspozicio en lokaj paperaj gazetoj kaj novaĵretejoj ĉiam aperas ampleksaj artikoloj pri Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Do, la informado estas sistema kaj ĉiuflanka.

Ekde aŭgusto 2017 la ekspozicio estis eksponita jam en 28 lokoj de Litovio. Estas planite, ke ĝi estos ekspoziciata en ĉiuj 66 distriktaj urboj de Litovio kaj en kelkaj plej grandaj urboj.



Reta kurso de Esperanto

Dum la pandemia periodo Litova Esperanto-Asocio kunlabore kun la populara novaĵretejo *Mano kraŝtas* (Mia lando) preparis kaj aperigis en ĉi tiu novaĵretejo retan ilustritan kurson de Esperanto por litovlingvanoj. Ĝi konsistas el 40 lecionoj. La aŭtorinoj estas konataj Esperanto-instruistinoj Gražina Opulskienė kaj Aida Čižikaitė. La tuta kurso de Esperanto estas videbla ĉe <https://www.manokrastras.lt/page/esperanto-kalbos-pamokos>

Jam 170 intervjuoj kaj artikoloj pri Esperanto

Dum 2020-21 kunlabore kun la novaĵretejo *Mano kraŝtas*, organizite de Litova Esperanto-Asocio, en tiu novaĵretejo estas konstante publikigataj intervjuoj kaj artikoloj de Litoviaj esperantistoj.

Kutime aperas du publikaĵoj semajne. Ĝis nun jam estas aperigitaj 170 artikoloj kaj intervjuoj de esperantistoj el 35 urboj de Litovio. En ĉi tiuj tekstoj Litoviaj esperantistoj kutime rakontas, kiel ili fariĝis esperantistoj kaj pri sia esperantista agado, kiel ili utiligas Esperanton en sia vivo k. s.

Ni deziras altigi ĝis 200 la nombron de tiuj intervjuoj kaj artikoloj. Sekvont-jare surbaze de ĉi tiu materialo ni intencas eldoni apartan libron en la litova lingvo. Ĉi tiu projekto estas unika en la mondo. Ĉiuj publikaĵoj estas troveblaj ĉe <https://www.manokrastras.lt/page/lietuvos-esperantininku-sajunga>


Beletra romano pri esperantisto

Fine de 2020 la eldonejo *Aukso žuvys* aperigis la litovlingvan beletran romanon kun la titolo en Esperanto *Vojaĝo* de Rugilė Audenienė – konata en Litovio ĵurnalistino kaj verkistino. Ĉi tiu romano bazita sur veraj faktoj kaj vivo de la konkreta familio – tiu de la avo de la aŭtorino, aktiva esperantisto (ĝis 1940) Juozas Gaidukas.


Rugilė Audenienė uzis konserviĝintan taglibron de sia avo, liajn leterojn, diversajn arkivajn materialojn, rememorojn de parencoj kaj de loĝantoj de regiono Kupiškis, de kie devenas la familio de la prototipo de la romano.

Esperanto iras tra la tuta libro kiel la ĉefa linio en malfacila periodo, kiam Esperanto de lingvo de paco kaj amikeco fariĝas malpermesita lingvo. Tamen ĝi restas lingvo de Espero por la tuta familio de Juozas Gaidukas kaj ĝenerala espero en malfacila vivoperiodo.

La libro fariĝis populara en Litovio. Pri ĝi aperis dekoj da artikoloj kaj intervjuoj kun la aŭtorino en diversaj gazetoj kaj retejoj de Litovio. La libro enhavas 476 paĝojn.



Deklingva vortaro de geografiaj terminoj



Fine de 2019 en Litovio aperis deklingva vortaro de geografiaj terminoj kompilita de d-rino Ieva Švarcaitė (Vilnius: VŠĮ “Grunto valdymo technologijos”, 2019, 287 paĝoj). Ĝia litovlingva titolo estas *Dešimtkalbis gamtinės geografijos terminų žodynas*. En ĝi geografiaj terminoj estas prezentitaj en litova, angla, germana, franca, Esperanto, hispana, itala, rusa, pola kaj latva lingvoj.

La vortaro estas unika en Litovio kaj en la tuta Eŭropo. En ĝi estas prezentitaj ĉirkaŭ 1500 plej ofte uzataj terminoj en ĉi tiu sciencobranĉo. Fine de la libro estas indeksoj de la vortoj en ĉiu lingvo aparte.

Esperanto aperis nehazarde. La aŭtorino ankoraŭ ekde sia studado en la Vilna universitato estas aktiva esperantistino, uzanto kaj disvastiganto de Esperanto. Ŝi ankoraŭ en 1959 partoprenis la unuan BET (tiam Baltia Esperanto-Tendaro) en Latvio. Ieva Švarcaitė ĉiam uzis Esperanton en sia scienca agado. Ŝi partoprenis multajn Universalajn Kongresojn de Esperanto kaj prelegis en ties Internaciaj Kongresaj Universitatoj pri geografiaj temoj. Ŝi verkis kaj publikigis multajn sciencajn artikolojn en Esperanto. Malgraŭ sia aĝo ŝi plu aktive laboras.

Povilas Jegorovas

E@I: Nova oficejo, nova urbo, nova estonteco

Ĉio, kio komenciĝas, ankaŭ finiĝas. Jes ja, tiu ĉi malnova vero (kio estas la bazo interalie por budhismo) validas ankaŭ por la oficejo de E@I – kiu ĝis nun, ekde 1a de julio 2011 situis dum precize dek jaroj en la urbeto Partizánske en Slovakio. La organizaĵo havas la sidejon en la urbo jam ekde 2005, sed nur de 2011 ĝi havis sian plene funkciantan oficejon, kie laboris dungitoj, volontuloj kaj staĝantoj.

Nun, post dek jaroj da funkciado en Partizánske venis la tempo por ŝanĝo kaj plia evoluo. Nome, E@I-oficejo kaj la tuta E@I-teamo translokiĝas al alia urbo, en kiu ĝi ekhavas ankaŭ novan oficejon. La urbeto nomiĝas Nová Dubnica (Nova kverkejo), situas 50 km for de la ĝisnuna loko, nur 6 km de la distrikta urbo Trenčín, apud la landlimo de Ĉeĥio. La apuda civito Trenčianska Teplá estas grava trajna nodo kaj situas nur 2 km de Nová Dubnica – tie haltas ĉiuj rapidtrajnoj, do, ekzemple, al la ĉefurbo Bratislavo oni povas veturi ĉiuhore.

La urbeto estas eĉ pli eta ol Partizánske, sed ĝi havas pluraj plusojn:

- trankvila etoso (la vivo donas impreson de “feria loko”)
- ĉirkaŭa naturo (la urbo estas ĉirkaŭita de arbaroj)
- pieda/bicikla proksimeco de ĉio (facila kaj ekologia vivstilo)
- proksima aŭtoŝoseo (nur 5 km)
- bona trajna konekto (ĉiuhoraj trajnoj, konekto inter Bratislava-Košice)
- apudeco de pli grandaj urboj (6 km en ambaŭ direktoj)
- apudeco de Ĉeĥio (16 km)

ktp.

Nova loko — novaj planoj

En la urbo jam situas duetaĝa Esperanto-domo, en kiu nun loĝas parto de la E@I-teamoj (nuntempe kvin homoj, aldoniĝos kelkaj pliaj dum sekvaj semajnoj/monatoj). La nova oficejo situas nur 250 metrojn for de la Esperanto-domo, kaj ĝuste nun ĝi estas rekonstruata, por ke ĝi povu esti somere plene ekipita kaj pretigita por E@I-laboroj. La oficejo estas duoble pli granda ol la ĝisnuna, kiu ebligas kaj gastigon de pli da volontuloj/staĝantoj, sed ankaŭ laboron de pliaj dungitoj. Aldone ja bezonatas spaco por stoki diversan ekipaĵon, kiu estas uzata por organizi diversajn eventojn, sed ankaŭ por stoki eldonaĵojn. Julio estos “translokiga” monato por E@I, dum kiu necesos ĉiun ekipaĵon, meblojn, librojn ktp. transporti de la ĝisnuna loko al la nova.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Funebraj notoj

La 31an de marto 2021 en Belgio forpasis

Vladimir Vladimirovič Samodaj (Владимир Владимирович Самодай, 1935-2021)

Sovetunia kaj Ruslanda filologo, tradukisto, ĵurnalisto kaj esperantisto (1958); vicprezidanto de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetiaj Esperantistoj ĉe Unio de Sovetuniaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando (1970-79) kaj redaktoro de ĝiaj Esperanto-eldonaĵoj, vicprezidanto de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (1979-89), prezidanto de Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo (1989-90), komitatano de MEM (1978-83) kaj UEA (1989-90); redaktoro de *Scienco kaj Kulturo* (1995-2012), aŭtoro de *Konfesoj* (1992), *Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM* (1999), *Esperanto kaj vivo* (2010); honora membro de UEA (2004).

La 15an de aprilo 2021 en sia 79a vivojaro pro COVID-19 forpasis

Venelin Mitev (Венелин Иванов Митев, 1942-2021)

konata bulgara ĵurnalisto, redaktoro, verkisto kaj tradukisto, kunlaboranto de Bulgara Informa Agentejo (BTA, 1967-84), redaktoro de la popularaj bulgaraj gazetoj *Паралели* (Paraleloj, 1984-93), *Жълт вестник* (La Flava Heroldo, 2000-05) kaj *За жената* (Por la Virino, 2005-12), aŭtoro kaj tradukinto de verkoj en la lingvoj bulgara, rusa, franca kaj Esperanto.

Mitev lernis Esperanton en 1958, verkis centojn da artikoloj, eseoj kaj beletraĵoj en Esperanto, estis vicprezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio (1990-96), redaktoro de la bulgarlingvaj gazetoj pri Esperanto *Mondo* (1990) kaj *Panorama Esperanto* (1993-95), kaj de *Bulgara Esperantisto* (1999-2002); aŭtoro de la libroj *Tradukarto* (1991), *Somero Cigana* (1993), *Vaganto inter la stiloj* (2016); kuntradukinto de *De bordo al bordo* (1988) de Elisaveta Bagjana kaj de la antologio de la bulgara ampoezio *Mi ĉiam tia remetoru vin* (1992). Inter liaj bulgarlingvaj libroj estas lia poemaro *Взривени сънища* (Eksplozigitaj sonĝoj, 2002) kun bulgaraj tradukoj de poemoj de William Auld, Marjorie Boulton, Kalman Kalocsay, Tibor Sekelj, Giorgio Silfer, Eli Urbanová kaj Edwin de Kock.

La 23an de aprilo 2021 en Milanówek forpasis

Andrzej Pettyn (1938-2021)

pola instruisto kaj radioredaktoro, li en 1957 lernis Esperanton kaj ekde 1962 dum pli ol 40 jaroj laboris en la Esperanto-redakcio de la Pola Radio (kaj dum 12 el tiuj jaroj ankaŭ en la finna redakcio). Pettyn instruis Esperanton, verkis plurajn lernolibrojn, vortarojn, legolibrojn k. a., inkluzive de la populara lernolibro *Ĉu vi parolas Esperante?* (1988) kaj la anekdotaro pri famuloj *100 pri cent* (1989); lia voĉo sonas en kelkaj instrukasedoj kaj en la filmo *Mazi en Gondolando*. Li estis komitatano (1972-2001, kun du paŭzoj), estrarano (1977-80) kaj honora membro (2005) de UEA, membro de la Akademio de Esperanto (1976-2007).

Ni funebras kaj kondolencas al la parencoj, amikoj kaj samideanoj de la forpasintoj.

**Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov**

Tribuno




La 15an de junio 2021 post longa paŭzo okazis Landa Kunveno en Tel-Avivo (vidu la supran foton). Koincide, je la sama tago en Israelo estis nuligita deviga maska reĝimo por kunvenoj en fermitaj spacoj. Ĉi-numere Amri Wandel rakontas pri problemoj kaj sukcesoj en la kontraŭviroza batalo en Israelo kaj en la mondo.

Ĉu Israelo venkis la pandemion? Malgraŭ la viruso kaj la virtualaj kunvenoj, denove kunvenas “homoj kun homoj”

Unuafoje post la pandemio: vigla ĉeesta Landa Kunveno okazis en Tel-Avivo la 15an de junio 2021. Ĉirkaŭ 30 personoj sen maskoj dum tri horoj ĝuis kantojn, prelegojn kaj interbabiladon. Denove personaj renkontiĝoj, regalo kaj... homoj kun homoj.

Simbole je la sama tago Israelo nuligis la devon de maskoj ankaŭ por kunvenoj en fermitaj spacoj. Ĉiuj ĉeestantoj ricevis paperan ekzempleron de la ĵus presita nova numero (№171) de *Israela Esperantisto*. La necesaj formalizaĵoj estis agrable apartigitaj per kantoj de Enrica kaj Israela. Oni omaĝis al Matilda Landau, kiu dum jardekoj estis la organizanto de la arta programo en la landaj kunvenoj. Sekvis la kanto *Imagu* kantita de Enrica kaj ĉarma prezentaĵo de Stav – junulino kiu mem lernis Esperanton per Duolingo nur antaŭ du monatoj kaj jam verkis Esperanto-kurson. Oni prezentis la Israelan Kongreson, planitan por oktobro post prokrasto de unu jaro kaj duono, kaj Amir aŭdigis fascinajn registraĵojn de la Esperanto-kantistino Israela. Amri prelegis hebree pri “Libroj, homoj kaj Esperanto” kaj prezentis sian novan libron *Astrofiziko kaj Vivo en la Universo*, ĵus eldonitan de la universita





1. Evoluo de novaj infektiĝoj en pluraj landoj

eldonejo *Academon* (la unua lernolibro pri astrofiziko kaj astrobiologio en la hebrea lingvo), kaj la IKU-libron 2021. Enrica kantis *Leteron al Zamenhof*, kaj sekvis paŭzo, dum kiu ĉiuj entuziasme interparolis kun ĉiuj, post unu jaro kaj duono (la lasta Landa Kunveno estis dum la Zamenhofa tago en 2019). Aldonaj fotoj troviĝas en la Facebook afiŝoj de Amri kaj de Jael.

Ĉu Israelo tro rapide nuligis la pandemiajn barojn?

Kiam aperis la koronaviruso, malmultaj kredis, ke dum apenaŭ unu jaro oni sukcesos produkti efikan vakcinon, sed ĝi realiĝis: sojle de 2021 alvenis la unuaj vakcinoj. La esperoj estis altaj, sed nur malmultaj landoj sukcesis efike vakcinigi grandan parton de la enloĝantoj. Inter ili elstaris Israelo, kie dum malmultaj monatoj vakciniĝis 60% de la loĝantaro, kaj fine de majo 2021 la pandemio aspektas kiel fora koŝmaro.

Amri Wandel

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Lingvo



Dum la dudek lastaj jaroj danke al la amasa instruado de Esperanto en Hungario sukcese plenumis la lingvan ekzamenon pri Esperanto pli ol 35 mil homoj! Pri ĉi tiu glora epoko, ties rezulto kaj fino en ĉi tiu *Ondo* rakontas László Szilvási, gvidanto de privata propra lingvolernejo, en kiu lernas Esperanton ĉiujare pluraj centoj da personoj.

Ĉu novas *Lingua Franca Nova*?



de Věra Barandovská-Frank

La termino “lingua franca” (lingvafrankao) estas nuntempe kutime uzata por indiki etnan lingvon funkciantan kiel interlingvo, t. e. uzatan por interkompreniĝo de homoj kun reciproke nekomprenablaj denaskaj lingvoj. Tute normale oni asertas, ke la angla lingvo estas la plej disvastiĝinta lingvafrankao en la mondo, aliaj lingvafrankoj estas, ekzemple, la araba, la mandarena ktp., eĉ Esperanto estas foje nomata tiel. De kie venas tiu termino?

1. La “malnova” Lingua Franca

La unua historia lingvafrankao, nomata ankaŭ “Lingua Franca del Levante”, estis Romana piĝino uzata por precipe buŝa komunikado en la mediteranea regiono¹ dum ĉ. okcento da jaroj. La navigadon kaj komercadon en tiu regiono oni praktikis jam ekde antikvaj tempoj, uzante probable iun latindevenan (miks)lingvaĵon.

Ĝia nomo laŭ unu el la teorioj originas en la tempo de krucmilitoj (11-16a jc.), kiam ĝi estis uzata de kruckavaliroj, soldatoj, pilgrimantoj k .s. La francaj kavaliroj fondis en 1099 Jerusaleman reĝlandon. Ĉar la francoj estis la unuaj eŭropanoj, kiujn oni tie renkontis, “Lingua Franca” signifis “lingvo de kristanaj eŭropanoj”. Alia teorio diras, ke komercistoj, kiuj uzis tiun lingvon en multaj havenoj, ĝuis tie “porto franco”, do liberan komercadon. Poste envoviĝis en la komerco kaj vojaĝado italoj, hispanoj, portugaloj, francoj kaj pliaj Romanoj, kies lingvoj formis la portantan latinidan supertavolon de la piĝino. Aliflanke aldoniĝis araboj, turkoj, grekoj, judoj kaj aliaj nacioj, kies lingvoj reprezentis la aldonan influon, subtavolon. Lingua Franca iĝis ĉiutaga lingvo de maristoj, komercistoj, piratoj, vojaĝantoj, pastroj, soldatoj ktp., kiel atestas multaj personoj. (Pli detale Barandovská-Frank 2020).

Lingua Franca konserviĝis en sepdeko da skribaj specimenoj. La unua estas opiniata “Credo de Constantinople”, la konata kristana preĝo en manuskripto el 1204. La dua malnova konata skriba dokumento estas “Compasso da Navegare”

¹ Levante, “kie la suno leviĝas” estas orienta mediteranea parto (Levantenio).

(1296), la unua navigacia mapo priskribanta Mediteraneon. Alia frua specimeno estas “Contrasto della Zerbitana”, poemo-dialogo de musulmana kaptitino el Ĝerbo kaj itala moŝto, ekestinta komence de la 14a jc., skribe notita ĉirkaŭ la jaro 1353. Krome konserviĝis baladoj, vojaĝpriskriboj kaj aliaj specimenoj, atestantaj, ke Lingua Franca estis vivanta ĉiutaga lingvo ĉefe en Berberio¹, kie ĝi servis eĉ kiel lingvo diplomacia (vidu Corré 2005). Male, la primoka uzo de ĝi en novepokaj komedioj (ekzemple, Carlo Goldoni, Lope de Vega, Molière) prezentas ĝin precipe kiel lingvon de sklavoj, servistoj kaj metiistoj. En 1830, kiam Francio okupis Alĝerion, Tunizion kaj Marokon, oni eldonis vortaron “Dictionnaire de la Langue Franque ou Petit Mauresque” por ebligi la komunikadon de francaj soldatoj kun la okupitoj. La vortaro enhavas ĉ. 2100 vortojn kaj aron da dialogoj por lerni konversacion. Pluajn specimenojn oni trovas en francaj libroj pri Berberio, ekzemple, “La France coloniale illustrée” (1888) de Alexis Gochet.

La ĥaraktero de skribaj dokumentoj supozigas ekziston de pluraj variaĵoj aŭ eĉ dialektoj de Lingua Franca. Ĝia bazo tamen estas sendube Romana, tial la unua moderna specialisto pri ĝi estis la fama romanisto kaj “patro de kreolismo” Hugo Schuchardt (1909). Diversaj esploristoj atestas lingvistikan kontinuan de Lingua Franca, kiu, kvankam karakterizebla kiel piĝino (primitiva gramatiko, mikso de lingvoj), evidente funkciis ĝis la fino de la 19a jc. kaj posttome dissolviĝis en la kolonia franca lingvo. Tiu ĉi longa vivdaŭro de la “prapatrino de ĉiuj piĝinoj”, kiel oni nomas ĝin, supozigas ĝian internan evoluon kaj eblan kreoliĝon (vidu Zago 2005).

2. La alternativoj

Ni unue rigardu la lingvojn, kiuj formis la karakterizan supertavolon de Lingua Franca. Ili ĉiuj devenas de la sama fonto, la latina lingvo. Post la disfalo de la Romia Imperio en la kvina jarcento, la latina lingvo ĉesis esti oficiala/ŝtata. Unuflanke, ĝi plu funkciis kiel instrumento de kleriĝo kaj kiel literatura lingvo dum la mezepoko kaj humanismo, kiel terminologia fonto, eklezia referenclingvo kaj ceremonia lingvaĵo ĝis la 20a jc., kiam ĝi eĉ spertis revivigon sub la nomo “Latinitas Viva”. Aliflanke, ĝia vulgara formo iĝis decida supertavolo de latinidaj (Romanaj) lingvoj, kun aldono de karakterizaĵoj el lokaj “barbaraj” lingvoj, kiuj kaŭzis la diferencigon kaj kondukis al stabiligo de unuopaj skriblingvoj.

Praktike la latinidaj lingvoj en siaj komencoj ankoraŭ reciproke kompreneblaj, transiris la saman procezon kiel la piĝinoj: la gramatiko simpliĝis, ekzemple, per malapero de deklinaciaj finaĵoj kaj redukto de gramatikaj genroj, prefero de analizaj formoj kun prepozicioj kaj uzo de helpverboj. La prononco subiris influon de subtavolaj lingvoj kaj/aŭ sekvis apartan fonetikan evoluon. Kelkaj latinidoj atingis

¹ Landoj de berberoj ĉe la nordafrika marbordo okcidente de Levantenio, do la sultanlando Maroko kaj la osmanaj regentejoj Alĝerio, Tunizio kaj Tripolio/Libio. La arabdevena termino Magrebio estas nun pli konata.

la pozicion de ŝtataj lingvoj (la itala, la franca, la kastilia/ hispana, la portugala, la rumana), aliaj posedas diversan gradon de oficiala agnosko sur sia teritorio (la galega, la kataluna, la asturia, la aragona, la okcitana, la provenca, la arpitana, la romanĉa, la piemonta, la sicilia, la taranta, la sarda k. a.). La sefardan/ĝudezman oni en la 15a jc. portis el Hispanio en diasporon.

Kiel sekvo de la koloniigo de ekstereŭropaj teritorioj, kiun larĝskale startigis Portugalio en la 15a jc., sekvita de la rivala Hispanio, kaj poste aliaj landoj inklude de Francio kaj Italio, ekestis nova generacio de latinidaj lingvoj, karakterizataj kiel kreolaj kaj parolataj en ĉiuj mondopartoj. Kvankam ili pro politikaj kialoj estas malofte oficiale agnoskataj, en kelkaj landoj ilin uzas la plejmulto de la loĝantaro kiel denaskan. Ekzistas dekoj da ili, ekzemple, la francecaj haitia, sejšela, gvadelupa, maŭricia; portugalecaj kaboverda, gvineo-bisaŭa, angola, saramakana, malaka, makaa, papiamento, forro; hispandevenaj ĉabakana, palenkera, bozala, piĉinglis. Ili estas, laŭ sia historia deveno, heredantoj de Lingua Franca. La plej gravaj estas analizataj en la Oksforda atlaso (Michaelis et al. 2013).

Latinidaj lingvoj enhejmiĝis en preskaŭ ĉiuj kontinentoj kaj la latinidaj esprimoj penetris en la formo de internaciismoj en ĉiujn eŭropdevenajn lingvojn. Eĉ en la angla lingvo, pro la influo de romanigitaj normanoj ekde 1066, latinidaj esprimoj reprezentas la plej grandan parton de vortprovizo. Dum jarcentoj ekzistas streboj plibonigi la internacian komunikadon kun helpo de latinidaj planlingvoj. Oni povas observi du bazajn alirvojojn, kiuj praktike venas al la sama rezulto:

1) konforme al la postulo, ke la internacia lingvo estu simpla kaj facila, oni simpligas la latinan: per forigo de gramatikaj finaĵoj, analiza fleksio, regula derivado – principe temas pri la sama procezo, kiu okazis spontanee dum la ekesto de latinidaj etnolingvoj. Ekzistas dekoj da tiaj projektoj, amase aperintaj ekde la 19a jarcento (vidu Duliĉenko 1990), kun klare karakterizaj nomoj kiel Néó Latine (Courtonne 1875), Nov Latin (Rosa 1890), Novilatiin (Beerman 1895), Latinesce (Henderson 1901), Latino internationale (Basso 1910), Interlatino (Meysmans 1911), Neo-Latina (Diemen 1920), Latin simplifié (Reverchon 1925), Latin simplificat (Bijlsma 1930), Neolatinus (Monte Rosso 1939), Neulatinische Sprache (Pompiani 1956), Neulatein (Lorenz 1971), Latino Moderne (Stark ĉ. 2000), Neolatio (Cassany Bates 2006) k. a. La plej fama reprezentanto de tiu ĉi grupo estas Latino sine Flexione, kreita en 1903 de la fama itala matematikisto Giuseppe Peano, uzita en scienca literaturo kaj flegita kiel oficiala lingvo de Academia pro Interlingua, grava institucio en la historio de interlingvistiko.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Malgranda fina venko – kaj velko en Hungario



de László Szilvási

En la pasintaj 20 jaroj okazis unika fenomeno, vere amasa instruado de Esperanto en Hungario, kvazaŭ “malgranda fina venko”. Sukcese plenumis la lingvan ekzamenon pli ol 35 mil homoj! Bedaŭrinde, tiu glora epoko finiĝis, kaj eble estas interese ekkoni kelkajn detalojn, nombrojn, problemojn kaj kaŭzojn – por laŭeble eviti ilin ĉe eventuala apero de simila eblo en alia loko, alia lando.

Mi okupiĝas pri la movada organizado ekde 30-40 jaroj, mi aktivis en preskaŭ ĉiuj niveloj, diversaj organizoj, diversaj estraroj ktp. Nuntempe de multaj jaroj mi gvidas mian propran lingvolernejon (klasikan kaj interretan), kie lernas Esperanton ĉiujare pluraj centoj(!) da personoj.

Por ricevi universitatan diplomon studentoj en Hungario devas trapasi ankaŭ lingvan ekzamenon en specialaj ekzamenaj centroj. (Krome, post la mezlernejo, ĉe la universitataj akceptaj ekzamenoj studentoj povas ricevi kromajn poentojn pro lingvaj ekzamenoj, inkluzive Esperanton – sed tio nun estas flanka temo.)

Ŝtate rekonitajn lingvo-ekzamenojn pri Esperanto organizas la Ekzamena Centro Origo (antaŭa nomo ITK), institucio de la budapeŝta universitato ELTE, kiu organizas la ekzamenojn en niveloj KER-B1, B2 kaj C1. Kiel konate, UEA subskribis kunlaboran kontrakton kun tiu ĉi institucio por realigi Esperantajn lingvajn ekzamenojn dise en la mondo.


Esperanto estis akreditita en la jaro 2000, do post tiam studentoj paŝon post paŝo malkovris la avantaĝojn de la rapida ekzameniĝ-eblo.

Ekde la komenco mi notas la statistikajn datumojn, jen la ĉefa kurbo pri la kvanto de Esperanto-lernantoj (*vidu la grafikaĵon en la sekva paĝo*).

La falon post 2007 kaŭzas pluraj faktoroj, indaj je iama pli detala analizo. Unu el la ĉefaj kaŭzoj estis la konsciiĝo de universitataj gvidantoj pri la reala (sen)utileco de Esperanto en la faka tereno, manko de atingebla faka literaturo por siaj studentoj, manko de faka aplikeblo. Ekzisto de unu ekzemplero de iu libro en la Biblioteko Hodler aŭ en Esperanto-Muzeo Wien ne signifas utilon por la studentoj...

Okazis, ke funkciulo de dekanejo pretis akcepti Esperanton, se mi povas montri

Esperanto-ekzamenoj en Hungario



al li manplenon de libroj pri ilia fako, metalurgio... – kaj okazis, ke alia vicdekano simple priridis min, parolante pri la kvanto de atingebla Esperanta faka literaturo por studentoj de la medicina universitato...

Kompreneble pri la falo ludis rolon pluraj aliaj faktoroj, ekzemple, manko de publika agado de la landa asocio, manko de intereso-reprezentado, manko de merkataj rimedoj, manko de kontaktado de la koncernaj decidofarantoj en unuopaj universitatoj, ktp. La rezulto estas tio, ke unu post la alia, universitatoj ne plu akceptis Esperantan ekzamenon. Nuntempe restis nur kelkaj fakoj kiel psikologoj, konstru-inĝenieroj, infanĝardenaj pedagogoj, ktp. kie oni daŭre akceptas ĝin.

Formado de la publika bildo pri Esperanto estas tasko de esperantistoj mem (kaj de iliaj organizaĵoj), sed pri tio oni ne aŭ apenaŭ okupiĝis en la pasintaj 20 jaroj...

Tendenco de Esperanto-ekzamenoj en Hungario – lastaj 10 jaroj –



Prijuĝo de Esperanto en Hungario estas dupolusa afero. Intelektuloj de antaŭaj generacioj kutime havas pozitivan opinion pri ĝi, sed tiu pozitiva fono jam mankas ĉe la junularo kaj ĉe la plenkreska anglo-snobisma tavolo. Plejparto de junuloj jam simple ne havas konojn pri la fono kaj la ekzisto de Esperanto, multaj el ili vidas nur ekzameno-trompilon en ĝi.

Ekzistas ankaŭ multaj snoboj, kiuj klopodas aparteni al venkanta partio (ili konsideras tion la angla).

Pritakso de valoro de naciaj lingvoj ne ligiĝas al iliaj konkretaj lingvaj valoroj kaj uzebloj, en la socia konscio ili estas aŭtomate rekonataj – sed tio ne validas por Esperanto, kaj ne plene veras por la romaa lingvo, pri kiu ekzistas antaŭjuĝoj. Multaj universitatoj ŝanĝis la vortumadon de ilia regularo al la vortumo: “Por la lingvoekzameno estas akceptataj nur la oficialaj lingvoj de EU” aŭ la “oficialaj lingvoj de la membroŝtatoj de UN”... – Tiel ili evitas diskriminacion al Esperanto kaj romaa lingvoj, tamen ekskludante ilin.

Tro sukcesa misreklamo — malsukcesaj ekzamenoj

La koeficiento pri sukceso ĉe Esperanto-ekzamenoj dum multaj jaroj estas 39-41%. Tio signifas, ke el 10 ekzamenitoj sukcesas nur 4 personoj...

Unu el la kaŭzoj estas la tradicia fuŝa slogano pri la facileco de Esperanto. Ekzistas personoj, kiuj pro la “facileco” decidas havi ekzamenon pri Esperanto, do ili rapide plenigas la aliĝilon en la reto por la sekva ekzamendato post 1-2 monatoj, kaj nur post tio ili komencas pensi, kie kaj kiel lerni la lingvon? Ili eĉ ŝutas ion-tion el la reto, kaj iras al ekzameno – kie evidente ili malsukcesas.

Bazo de ilia faro estas la onidiro, ke Esperanto estas “facila lingvo”. La esprimo “facila lingvo” tamen psikologie signifas, ke oni eĉ ne devas serioze lerni ĝin...!

En nia Esperanto-Centro ĉe www.eszperanto.hu jam de multaj jaroj ni forcenzuris la vorton “facila”, kaj en la reklamoj ni diras, ke “Esperanto estas multe pli rapide lernebla ol la naciaj lingvoj...” – sed tio jam ne ŝanĝas la publikan opinion...

Alia kaŭzo de la alta fiasko-kvociendo estas la fakto, ke Esperanton elektas ĉefe tiuj homoj, kiuj ne sukcesis ellerni alian lingvon en sia vivo... (kompreneble, ekzistas esceptoj). Dum ordinaraj homoj bezonas kutime kvar-kvin monatojn por atingi B2-nivelon, tiuj homoj bezonus signife pli, sed pro financaj/profitaj kialoj multaj instruistoj organizis/-as trimonatajn kursojn... – kiuj estas malpli kostaj, do la homoj elektas tiujn...

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



“Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu!”. Ĉi tiu slogano de la bolŝevistoj, kaptintaj en 1917 la potencon en Ruslando, ŝajnis subteni la ideon pri alpreno de lingvo internacia, facile studebla de ĉiu laboristo. (Sur la supra foto estas esperantistaj varbantoj en la Neva avenuo en Petrogrado 1919.)

Jubileoj kaj memordatoj en julio 2021

1. Antaŭ 30 jaroj (1991) en Sverdlovsk (nun Jekaterinburg) aperis la unua numero de la renaskita gazeto *Ruslanda Esperantisto* (ĉiumonata informilo de Urala Esperantista Societo).

4. Antaŭ 100 jaroj mortis **Antoni Grabowski** (1857-1887-1921), pola kemiisto, terminologo, poligloto, volapukisto kaj esperantisto; la unua prezidanto de Pola Esperanto-Asocio (1908-21), sekretario de la unua UK en Bulonjo (1905), devenca membro de la Lingva Komitato (LK, 1905-21) kaj Akademio de Esperanto (AdE, 1908-21), direktoro de la sekcio por la Gramatiko de AdE (1908-21). Kvankam Grabowski verkis malmultajn poemojn en Esperanto, oni konsideras lin “patro de la Esperanta poezio” pro la unua poezia Esperanto-antologio *La liro de la Esperantistoj* (23 originalaj kaj 87 tradukitaj poemoj), kiun li kompilis kaj eldonis en 1893, kaj pro liaj tradukoj, inter kiuj elstaras la antologio *El parnaso de Popoloj* (1913), kompilita kaj tradukita de li el trideko da lingvoj, kaj *Sinjoro Tadeo* (1918) de A. Mickiewicz; inter liaj tradukoj estas ankaŭ *La neĝa blovado* (A. Puŝkin, 1888), *La gefratoj* (Goeto, 1889), verkoj de A. Mickiewicz, J. Słowacki, H. Sienkiewicz k. a. Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 110-111.

6. Antaŭ 30 jaroj (1991) en Sverdlovsk komenciĝis la unua internacia esperantista renkontiĝo **Eŭropo-Azio '91** kun partopreno de cent personoj el ses landoj (33 el Eŭropo, 67 el Azio).

12. Antaŭ 80 jaroj estis mortpafita (kune kun multaj Bjalistokaj judoj) de germanaj nazioj **Jakobo Ŝapiro** (Jakub Szapiro, 1897-1911-1941), Ruslanda, poste Pollanda kaj Sovetunia (1939-41) juda ĵurnalisto, instruisto kaj esperantisto, konata en Esperantujo kiel Joŝo; kunfondinto (1922) kaj prezidanto (1924-39) de Esperanto-Societo “Ludoviko Zamenhof” en Bjalistoko, ĉefdelegito de UEA por Pollando (1928-?); kelkfoja laŭreato de Internaciaj Floraj Ludoj, aŭtoro de *La mondmilito kaj Esperanto* (ruslingva, 1915), *Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano* (1921) kaj de la unua gvidlibro pri Bjalistoko en Esperanto (1922), tradukinto de pluraj verkoj el la jida, rusa kaj pola lingvoj.

14. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Ismael Gomes Braga** (1891-1907-1969), brazila librotenisto, poligloto kaj esperantisto; fondinto (1937) kaj dum pli ol 30 jaroj direktoro de la Esperanto-fako de Brazila Spiritisma Federacio, longtempa vicprezidanto de Brazila Esperanto-Ligo; li verkis aŭ adaptis plurajn lernilojn: aperis dek eldonoj de *Primeiro manual de Esperanto* (1940); ses eldonoj de *Dicionário Esperanto-português* (1956), kvin eldonoj de lia portugala versio de la praktika kurso

de F. Szilágyi (1952); tradukis fundamentajn spiritismajn librojn de Allan Kardec, tradukis en la portugalan *Esencon kaj estontecon...* de Zamenhof (1937).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 106-108.

25. Antaŭ 40 jaroj (1981) en Braziljo komenciĝis la **66a Universala Kongreso de Esperanto** – la unua UK en Suda Ameriko.

26. Antaŭ 133 jaroj (1887) en Varsovio aperis la **Unua Libro** de Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof – la naskiĝdato de Esperanto.

26. Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Paul Berthelot** (bertló, 1881-1899-1910), franca presisto, anarkiisto, spiritisto kaj esperantisto; fondinto de Kataluna Esperanto-Grupo (1904) kaj de ties organo *Espero de Katalunjo* (1905) por kunligi katalunajn esperantistojn de Hispanio kaj Francio; fondinto de la gazeto *Esperanto* (1905) kiun li en 1907 cedis al H. Hodler (en 1908 ĝi iĝis la organo de UEA), fondinto de *Internacia Socia Revuo* (1907), organizinto de la unua kongreso de “verdruguloj” kadre de la 2a UK (Ĝenevo, 1906); membro de LK (1909-10); aŭtoro de *Vocabulaire Français-espéranto* (kun T. Cart kaj M. Merckens, 1903), *Komercaj leteroj* (kun Ch. Lambert, 1903), *Fonetiko litera* (1904), *Provo de ĥemia nomigado en Esperanto* (1904); lia franclingva anarkiisma verko *L'évangile de l'heure* (La Evangelio de la horo) aperis en Esperanto posteume en 1912 kun pluraj postaj reeldonoj.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 34-35.

26. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Lucija Borčić** (1921-1940-2015), kroata manartistino (fadenoj kaj lano) kaj esperantistino; sekretariino de la 38a UK en Zagrebo (1953); aŭtoro de *Granda vortaro Esperanta-kroata* (2008), *Granda vortaro kroata-Esperanta* (2009) kaj *Pulsas la viv'*; *poemoj 1997-2001* (2001); tradukinto de multaj kroataj verkoj; honora membro de UEA (2001).

26. Antaŭ 35 jaroj (1986) en Pekino komenciĝis la **71a Universala Kongreso de Esperanto** – la unua UK en Ĉinio, kiu spronis la Esperanto-movadon en Ĉinio.

29. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Gaston Waringhien** (varengjen, 1901-1916-1991), franca filologo, instruisto, tradukisto kaj esperantisto; membro de LK (1926-48), kaj AdE (1937-91), direktoro de la sekcio por la Ĝenerala Vortaro (1951-65), prezidanto de AdE (1963-79); fondinto (1934) kaj direktoro (1934-63) de Franca Esperanto-Instituto; la sola redaktoro de *La Nica Literatura Revuo* (1955-62). Li estas ofte konsiderata kiel la ĉefa Esperanto-intelektulo pro sia elstara kontribuo al pluraj sferoj:

Esperantologio: kunaŭtoro de *Plena Vortaro de Esperanto* (1930); aŭtoro kaj redaktoro de *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (1970) kiu dum pli ol 50 jaroj restas la ĉefa Esperanto-vortaro; aŭtoro de *Grand dictionnaire espéranto-français* (1957); kunaŭtoro (kun K. Kalocsay) de *Plena Gramatiko de Esperanto* (1935), kiun

li post la morto de K. Kalocsay reviziis kaj kompletigis kun la titolo *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* (1980);

Zamenhofologio: editoro de la duvoluma kolekto *Leteroj de L.-L. Zamenhof* (1948) kun pli ol 200 antaŭe nekonitaj leteroj kaj de *Lingvaj respondoj* (1962), aŭtoro de pluraj artikoloj pri Zamenhof, aperintaj ankaŭ en la dua kaj kvara volumoj de liaj eseoj.

Esearoj: 1. *Beletro* (1956, la 2a eld., ampleksigita aperis en 1987 kiel *Beletro, sed ne el katedro*), 2. *Lingvo kaj vivo: Esperantologiaj eseoj* (1959), 3. *Ni kaj ĝi: Pri religio kaj arto* (1972), 4. *1887 kaj la sekvo...* (1980), 5. *Kaj la ceter' – nur literaturo* (1983).

Beletro: du originalaj poemaroj aperintaj pseŭdonime (*Duonvoĉe* de G. E. Maura, 1938; plejparto de *Libro de Amo* de G. P. Peneter, kunlabore kun K. Kalocsay, 1965), tradukinto de pluraj verkoj, inkluzive de la kvarvoluma kolekto *Tra la parko de la franca poezio* (1977-84), *La floroj de l' malbono* (Ch. Baudelaire, 1957), *Kantoj kaj romanoj* de H. Heine (kun K. Kalocsay, 1969), *La robairoj de Kajjam* (1984), kaj la tri unuaj tagoj de *Dekamerono* de G. Boccaccio (kun P. Martinelli, aperis en 1995) k. a.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 295-297.

30. Antaŭ 65 jaroj mortis **Stanislav Kamarýt** (1883-1900-1956), ĉeĥa instruisto, filozofo kaj esperantisto, kunfondinto (1908) kaj prezidanto de Bohema Asocio esperantista; kundondinto, vicprezidanto kaj prezidanto de kelkaj sinsekvaj Esperanto-Asocioj en Ĉeĥoslovakio dum la intermilita periodo; prezidanto de la 13a UK en Prago (1921); komitatano (1932-36) kaj estrarano (1934-36) de UEA; kunlaboranto de *Enciklopedio de Esperanto*; membro de LK (1924-48) kaj AdE (1948-56); diverstempa redaktoro de *Český Esperantista, La Progreso, Ligilo, Bulteno de ĈAE* kaj *Esperantista*, aŭtoro de kelkaj Esperanto-lerniloj kaj de *Filozofia Vortaro* (1934), kunredaktoro de *Ĉeĥoslovaka Antologio* (1935); lia *Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*, finverkita en 1955, aperis nur en 1983; honora membro de UEA (1947).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 153-155.

31. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Delfí Dalmau i Gener** (dalmaŭ i ĝener, 1891-1909-1965), kataluna lingvisto, instruisto, verkisto kaj esperantisto; prezidanto de Kataluna Esperanto-Federacio (1924-28), membro de LK (1933-48) kaj AdE (1948-65); kunlaboranto kaj redaktoro de *Kataluna Esperantisto*, premiito kaj ĵuriano de la Internaciaj Floraj Ludoj, aŭtoro de *Ilustrita lernolibro de Esperanto* (1938), *Stenologio kaj stenografio* (1955), *Dialekto, Dialektiko* (1956), *Esperanta resumo de la stenologio kaj stenografio* (1961).

Aleksander Korjenkov

Antaŭ cent jaroj

La unua Ruslanda Esperantista Kongreso, organizita de Ruslanda Esperantista Ligo sub la prezido de kapitano A. Postnikov, okazis la 20–25an de aprilo 1910 en Peterburgo kun 103 partoprenantoj. Estis decidite okazigi la Ruslandajn kongresojn ĉiujare, kaj la sekva estis planita por Moskvo por 1912. Sed en 1911 Postnikov estis arestita, REL estis fermita, kaj la 2a Ruslanda Esperantista Kongreso okazis nur la 4-6an de aŭgusto 1913 en Kievo, kadre de la tutruslanda ekspozicio, sub la prezido de (ankaŭ kapitano) L. Illaŝeviĉ. La trian kongreson oni planis organizi jarŝanĝe, de la 27a de decembro 1914 ĝis la 2a de januaro 1915 en Moskvo, sed ĝi ne okazis, unue, pro la mondmilito, poste, pro la du revolucioj, interna milito kaj la “Milita Komunismo”.

Intertempe la loka movado revigliĝis, sed mankis organiza kadro por ĝi, starigebla nur en tutlanda kongreso, kaj esperantistoj el Niĵnij Novgorod proponis okazigi la trian kongreson aŭtune 1920 en sia urbo. Sed ĉar ili ne interkonsentis pri tio kun aliaj, al Niĵnij Novgorod venis nur kvin aliurbanoj, kaj oni renomis la kongreson konferenco. Fine, estis decidite kongresi en Petrogrado (eksa Peterburgo), sed pro la kontraŭbolŝevista ribelo de revoluciaj mararmeanoj en Kronŝtadt (komenco de marto 1921), kiuj postulis ke la potencon havu ne partioj, sed sovetoj, ĝi prokrastiĝis ĝis somero.

La tria kongreso okazis la 2-6an de junio 1921 en Petrogrado. La ĉefa solvenda demando estis organiza.

Estis klare, ke la neŭtrala modelo de la “burĝa” REL ne estas akceptebla en la ŝtato, regata de bolŝevistoj. Estis tri ĉefaj proponoj. Gvidantoj de ESKI (Esperanta Sekcio de la tria Komunista Internacio, fondita en novembro 1919, sed ne agnoskita de Kominterno) proponis starigi rigoran partian organizon, anarkiistoj preferis lozan federacion de diversspecaj kluboj kaj societoj, sed fine venkis la propono de E. Drezen, laŭ kiu la tutan landan movadon planu kaj gvidu centrigita organizo, ne partia, sed malfermita por ĉiuj lojaluloj al la reĝimo (ĉi tiel en SEU povis aktivi, ekzemple, Devjatnin, kiu antaŭ la revolucio dum kelka tempo laboris en polico). La 4an de junio 1921 estis fondita Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU) kun E. Drezen kiel ĝia gvidanto. Dudek delegitoj proteste forlasis la kongreson. (Devjatnin aludas pri tio: “kelkaj malagrablaj konfliktoj”, “kelkaj malkompreniĝoj, kreitaj de malgranda signifa areto da dandoj”, “kelkaj protestaj elpaŝoj de izolitaj ambiciuloj”.)

Sur la sekvaj paĝoj vi povas legi du prikongresajn tekstojn el *Esperanta Informilo*, organo de Petrograda Societo Esperantista. Kelkaj pliaj tekstoj aperos en la sekva *Ondo*. En ĉi tiuj tekstoj ni korektis nur mistajpojn kaj erarojn gramatikajn, sed netuŝitaj restis malsamformaj nomformoj kaj mallongigoj, rusismoj, nekonsekvenca (ne)uzado de la artikolo k. s.

Aleksander Korĵenkov

Historia kongreso.

Kiam, post la definitiva likvido de l' Kronŝtadtaj okazintaĵoj, ni, Peterburgaj esperantistoj, alpaŝis al la organizado de la ĵus finiĝinta Esperantista Kongreso, ni tute ne estis certaj pri sukceso de nia entrepreno.

Manko de monrimedoj, preskaŭ plena foresto de produktoj eĉ por la petrogradanoj mem, embarasoj de vojaĝado ĝenerale en Ruslando, jam estinta precedento kun malprospera Kongreso en Niĵnij Novgorod, kaj multaj aliaj malfavoraj cirkonstancoj – ŝajnis esti tiaj faktoroj, kiuj neniamaniere povis garantii al ni pli aŭ malpli sukcesan efektivigon de niaj revoj.

Sed antaŭ ni staris en tuta sia grandioza amplekso la gravega, neprokrastebla demando pri neorganiziteco de nia Ruslanda Esperantista laborado: ni estis neŝancebleble konvinkitaj, ke en tia stato, en kia ni estis ĝis nun, ni absolute ne estas kapablaj daŭrigi fruktoporte nian laboron sur la esperanta kampo, kaj se ni ne iros antaŭen, ni neeviteble iros reen.

Ni estis starantaj antaŭ tiu ĉi dilemo, kiel Cezaro antaŭ Rubikono, kaj, post longa meditado, ni, simile al Cezaro, diris: “loto estas ĵetita”, – kaj... ni transiris Rubikono!...

Tamen, pro tute komprenebla singardemo, ni ne kuraĝis kunvoki Tutruslandan Kongreson, kaj decidis organizi nur modestan Konferencon.

Kaj jen, post energiaj klopodoj, post senĉesa streĉita dumonata laborado de niaj sindonemaj gesamideanoj, unuan fojon post la tutmonda milito, malgraŭ ĉiuj malfavoraj cirkonstancoj, en Ruĝa Petrogrado “kolektiĝis pacaj batalantoj”: 163 reprezentantoj de 73 diversaj pli aŭ malpli malproksimaj lokoj de nia neampleksebla Sovet-Respubliko!

La sukceso superis niajn revojn, kaj ni havis plenan rajton anonci nian multnombrian kolektiĝon jam ne “Konferenco”, sed “Tutruslanda Esperantista Kongreso”.

La tasko de l' Organiza Komitato estis do plenumita brilege, kaj la kongresanoj havis plenan eblecon alpaŝi al siaj gravaj laboroj kaj al definitiva aŭtoritata solvo de la plej gravaj problemoj pri interna organiziĝo, pri taskoj de nia Esperanta movado kaj pri unuiĝo.

En tiu ĉi numero estas presitaj dokumentoj pri niaj dumkongresaj laboroj kaj, ĉiu konscia esperantisto, atente traleginte ĉi tiujn dokumentojn, devos esti plene kontentigita: malgraŭ kelkaj malagrablaj konfliktoj, neeviteblaj dum ĉiuspecaj kongresoj; malgraŭ kelkaj malkompreniĝoj, kreitaj de malgranda sensignifa areto da dandoj, vestitaj per “figa folieto”; malgraŭ kelkaj protestaj elpaŝoj de izolitaj ambiciumuloj; malgraŭ ĉio, – laŭ la atesto de diversaj decidoj kaj rezolucioj de la Kongreso, ni devas, konstati senduban fakton, ke la kongresanoj plene konsciis sian gravegan historian taskon kaj en ĉiuj la plej gravaj demandoj venis al la harmonia konsento!

Jes, ni plene konsciis nian historian taskon, ni komprenis unu la alian.

*“Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l’ homaron!..”*

Ni do stariĝis sur ĝusta, larĝa, rekta kaj tute nova vojo, kiu sendube alkondukos nin al plena venko kaj al triumfo de Esperantismo.

En tiu ĉi senco nia Kongreso akiris jam historian signifon...

Vivu do la “TRIA HISTORIA TUTRUSLANDA ESPERANTISTA KONGRESO”!
V. Devjatnin.

La III-a Tutruslanda Kongreso Esperantista.

Malfermo.

La 2-an de junio je la 12-a kaj 30 min. sam-ano Devjatnin anoncis la kunsidon malfermita. S-no Devjatnin salutis la kunveturintojn. Poste oni kantis “Internacinalon”, Funebran Kanton kaj “Espero’n”. Pro sukcesa efektiviĝo de l’ kunveno oni decidis nomi la konferencon “III-a Tutruslanda Kongreso Esperantista”.

Prezidantaro.

Estis elektita prezidantaro: Drezen, Devjatnin, Futerfas, Karatajev, Valentinov, sekretario: Rozanov, Ŝaber, Ŝĉavinskij kaj en la mandatan komisionon: Kusanikov, Lebedev kaj Radinkov. En honoran prezidantaron estis elektitaj: M. Gorkij, Henri Barbusse kaj Roman Rolland.

Salutoj.

S-no Devjatnin tralegis ricevatajn salutojn de: 1) Esp. Sekcio de l’ Terska Gubernia Polit-Kleriga Fako, 2) Kaŭkaza Komitato de Esperanto, 3) K-to de Krasnodaraj esp-toj, 4) Serpuĥova S-to, 5) Astraĥana Gubernia E-ta Komitato, 6) Urĵuma S-to, 7) Petrograda Kolektivo de “Peredvijniki”, 8) Estraro de la Klubo en nomo de k-do Lenin, 9) Mogileva S-to, 10) Krimea S-to, 11) Orenburga S-to, 12) Tula S-to k. m. a.


Oni proponis fari fotografan grupon de l’ membroj de l’ Kongreso. Oni faris interrompon kaj fotografiĝis. Poste la kunsido relaboris.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La oka ero en nia ciklo pri la rusaj romanoj de la 20a jarcento estas *En la unua rondo* (В круге первом) de Aleksandr Solĵenicyn (1918-2008). Same kiel la antaŭa serio, *Doktoro Ĵivago*, ĉi tiu verko, vaste konata kiel libro kaj filmserio, apenaŭ bezonas antaŭparolon (sed, jes, plurajn notojn).

En la unua rondo

Romano de Aleksandr Solĵenicyn

Jen la sorto de la nuntempaj rusaj libroj: eĉ se ili emerĝas, ili estas senplumigitaj. Ĉi tiel antaŭnelonge okazis pri “La majstro” de Bulgakov – la plumoj poste alfluis¹. Same pri ĉi tiu mia romano: por doni al ĝi almenaŭ etan vivoŝancon, por povi montri ĝin kaj porti ĝin al la redakcio, mi mem koncizigis kaj kripligis ĝin, pli ĝuste – mi disigis kaj denove kunmetis ĝin, kaj en tiu formo ĝi diskoniĝis.

Kvankam nun ne eblas reveni kaj korekti tion – jen la aŭtenta teksto. Cetere, restarigante, mi ĝin iom perfektigis, ja tiam mi havis kvardek jarojn, kaj nun mi estas kvindekjara.

verkita en 1955-1958
kripligita en 1964
restarigita en 1968

Dediĉita al miaj ŝaraŝkaj amikoj.

1. Torpedo

La aĵurecaj hormontriloj indikis kvin minutojn antaŭ la kvina.

En la velkanta decembra tago tute malluma estis la bronzo de la horloĝo sur la etaĝero.

La alta fenestro komenciĝis de la planko. Tra la vitroj sur la strato Kuzneckij Most sube videblis rapida strata trafiko kaj persista moviĝado de kortistoj, kiuj ŝovelis la ĵus falintan malpure brunan kaj jam malsekan neĝon de sub la piedoj de la pasantoj.

Rigardante al ĉi tio, sed ne vidante ĉi tion, la ŝtatkonsilisto de la dua rango Innokentij Volodin, apoginte sin al la fenestra framo, altvoĉe fajfis iun longan melodion. Per siaj fingropintoj li foliumis la buntajn glaceajn paĝojn de eksterlanda magazino. Sed li ne rimarkis, kio estas en ĝi.

Volodin, ŝtatkonsilisto de la dua rango, kio en la diplomata servo ekvivalentis

al subkolonelo, alta kaj magra, surhavanta ne sian uniformon, sed kompleton el glata ŝtofo, pli similis bonhavan junan farnientulon, ol respondecan oficiston de la ministerio pri eksteraj aferoj.

Jam necesis ŝalti la lumon en la oficejo, sed li ne ŝaltis, aŭ veturi hejmen, sed li ne moviĝis.

La kvina horo estis la fino ne de la labortempo, sed nur de ĝia pli mallonga taga parto. Nun ĉiuj veturos hejmen por manĝi kaj dormi, sed je la deka horo vespere denove eklumos pluraj miloj da fenestroj en la kvardek kvin tutsovetuniaj kaj dudek respublikaj ministerioj. Unusola persono post dekduo da muregoj havas sendormecon dum la noktoj, kaj li kutimigis la tutan ŝtatoficistan Moskvon vigili kun li ĝis la tria aŭ kvara horo nokte. Konante la noktajn kutimojn de la suvereno, sesdeko da ministroj, kiel lerneĵanoj, maldormas atendante alvokon. Por ne senti dormemon, ili venigas la vicministrojn, la vicministroj elhejmigas la fakestrojn, informistoj helpe de ŝtupetaroj priserĉas la kartoŝrankojn, sekretarioj kuregas tra koridoroj, steno-grafistinoj rompas kraĵojn.

Eĉ hodiaŭ, antaŭ la okcidenta Kristnasko (ĉiuj ambasadoj silentas jam du tagojn, sen telefoni), en lia ministerio tamen okazos la nokta sidado.

Kaj ĉe *tiu* nun komenciĝos dusemajna feriado. Trofidemaj beboj. Longorelaj azenoj.

La nervozaj fingroj de la juna viro rapide kaj sence foliumis la magazinon, sed interne de li la timo jen leviĝis kaj varmigis lin, jen ĝi malleviĝis, kaj tiam estis malvarme.

Innokentij forĵetis la magazinon kaj, kurbetiĝante, trairis la ĉambron.

Ĉu telefoni aŭ ne telefoni? Ĉu nepre nun? Aŭ *tie* ne estos malfrue?.. Ĵaŭde, vendrede?

Malfrue...

Estas maltro da tempo por pripensi, kaj tute kun neniu eblas interkonsiliĝi.

Ĉu ekzistas rimedoj por ekscii, kiu parolis el telefonbudo? Se paroli nur ruse? Se ne prokrasti kaj rapide eliri? Ĉu eblas identigi parolanton laŭ la modifita telefona voĉo? Tia tekniko ne povas esti.

Post tri-kvar tagoj li mem flugos tien. Logike necesus atendi. Prudente necesus atendi.

Sed estos malfrue.

Ho, diable – tremo trakuris liajn ŝultrojn, nekutimajn al pezaĵoj. Estus pli bone, se li ne ekscius. Ne scius. Ne ekscius...

Li per siaj manoj kunrastis ĉion sur la tablo kaj portis en la fajrorezistan monŝrankon. Lia maltrankvilo fortiĝis. Li metis sian frunton al la rufe farbita ŝtalo de la ŝranko, fermis siajn okulojn kaj iom ripozis.

Subite, kvazaŭ uzante la lastajn sekundojn, sen telefoni al la garaĝo por sia aŭto, sen fermi la inkujon, Innokentij svingiĝis, fermis la pordon, fordonis la ŝlosilon al la deĵoranto en la fino de la koridoro, preskaŭ kure desupris laŭ la ŝtuparo, devancante

lokajn gravulojn en ore broditaj uniformoj kun galonoj, rapide surtiris malsupre la palton, surkapigis la ĉapelon kaj elkuris en la humidan krepuskon.

Pro la rapidaj movoj li ekfartis pli bone. Liaj francaj ŝuoj, laŭmode sengaloŝaj, trempiĝis en la malpura degelanta neĝo.

Pasinte preter la fleksiĝinta Vorovskij² en la duonfermita korto de la ministerio, Innokentij rigardis supren kaj tremeris³. Nova sento prezentiĝis al li en la nova konstruaĵo de Boljšaja Lubjanka je la flanko de la strateto Furkasovskij⁴. Ĉi tiu griza-nigra naŭetaĝa korpego estis kirasita batalŝipego, kaj dek ok pilastroj, kiel dek ok kanonturoj altis je ĝia dekstra bordo. Kaj la soleca malfortika boato de Innokentij estis tirata tien, al la pruo de la peza kaj rapida ŝipo.

Ne, la boato ne estis altirata – ĝi mem, kiel torpedo, direktiĝis al la batalŝipego.

Estis neelteneble! Li turniĝis dekstren, laŭ Kuzneckij Most. Ĉe la trotuaro staris forveturonta taksio. Innokentij kaptis ĝin, pelis ĝin malsupren, kaj tie ordonis turni maldekstren al la strato Petrovka sub la ĵus lumigitaj lanternoj.

Li ankoraŭ hezitis – de kie li telefonu, por ke oni ne rapidigu lin, ne ĝenu lin, ne rigardu tra la pordo. Sed, serĉante apartan senhoman telefonbudon, li estos pli rimarkebla. Ĉu ne pli bonus esti en homamaso, nur ke la budo estu enmurigita? Kaj estas tre stulte vojaĝi en taksio kun ŝoforo kiel atestanto. Li mane fosis en sia poŝo, serĉante dekkvinkopekan moneron, kaj esperis maltrovi ĝin. Se tiel, li nature devos prokrasti.

Antaŭ la semaforo ĉe la strato Oĥotnyj Rjad liaj fingroj trovis kaj eltiris du dekkvinkopekajn monerojn. Do estu kiel estos.

Ŝajne, li trankviliĝis. Danĝere aŭ ne danĝere, sed alia solvo ne povas esti.

Ĉu ni restas homoj, ĉiam timante?

Innokentij tute ne planis tion, sed li veturis laŭ Moĥovaja ĝuste preter la Usona ambasadejo. Do, jen la sorto. Li premiĝis al la vitro kaj fleksis la kolon por vidi, kiuj fenestroj estas lumigitaj. Sensukcese.

Preterveturinte la universitaton, Innokentij kaggeste petis turni dekstren. Li kva-zaŭ rondiris sur sia torpedo, serĉante plej bonan pozicion.

La taksio fluge supreniris al la strato Arbat. Innokentij donis al la ŝoforo du biletojn kaj ekiris sur la placo, strebante ne rapidi.

Sekiĝis liaj gorĝo kaj buŝo, kaj neniun trinkaĵo povus kompensi tiun sekecon.

La tuta Arbat estis lumigita. Antaŭ la kinejo “Arta” estis densa vico por la filmo “Amo de balerino”. La ruĝan “M” super la metrostacio vualetis grize blua nebuleto. Malhelhaŭta sudulino estis vendanta flavajn floretojn.

La mortonta batalanto ne vidis sian ŝipan celon, sed lian bruston plenigis hela despero.

Gravas memori: diri neniun vorton angle. Des pli ne france.⁵ Lasi al la serĉistoj nek plumon, nek voston.

Innokentij iris rektiĝinte kaj tute ne rapide. Junulino, irante renkonte al li, levis al li siajn okulojn.

Kaj ankoraŭ unu. Tre ĉarma. Deziru al mi resti nedamaĝita.

Tre vastas la mondo, kaj multas ebloj en ĝi! Sed al vi restis nenio, krom ĉi tiu montara gorĝo.

Unu el la aparte starantaj lignaj budoj estis malplena, sed ŝajne kun frakasita fenestreto. Innokentij iris plu en la metroon.

Ĉi tie la kvar enmurigitaj budoj estis okupataj. Sed en la maldekstra estis finparolanta iu simplulo, probable ebrieta, li jam estis kroĉanta la parolilon. Li ridetis al Innokentij kaj estis dironta ion al li. Anstataŭinte lin en la budo, Innokentij per unu mano akurate altiris kaj tenis fermita la dikan vitropordon, kaj per la alia mano, kiu tremetis, ne sengantigante ĝin, li enmetis moneron kaj turnis la numeron.

Post kelkaj longaj zumoj oni malkroĉis la parolilon.

– Ĉu la sekretario? – li klopodis ŝanĝi la voĉon.

– Jes.

– Mi petas urĝe konekti min kun la ambasadoro.

– La ambasadoron ne eblas alvoki, – oni respondis al li en senerara rusa lingvo.

– Sed pri kiu demando?

– Se ne eblas, konektu min kun la aferŝarĝito! Aŭ kun la armea ataŝeo! Bonvolu ne prokrasti!

En la alia flanko oni pripensis. Innokentij decidis: se oni ne konektos – restu tiel, li ne reprovu.

– Bone, mi konektas la ataŝeon.

Rekonekto okazis.

Trans la spegula vitro, iom for de la budovico homoj kuris, rapidis, devancis unu aliajn. Iu ruliĝis ĉi tien kaj ekstaris, atendante apud la budo de Innokentij.

Iu diris en la parolilon per voĉo sata, pigra, kun tre forta akĉento⁶.

– Aŭskultas vin. Kion vi volis?

– Ĉu sinjoro armea ataŝeo? – Innokentij draste demandis.

– Yes, aviations, – oni pigre respondis de la alia flanko.

Kion fari? Mane ŝirmante la parolilon, per voĉo pli basa, sed rezoluta, Innokentij daŭrigis:

– Sinjoro aviada ataŝeo! Mi petas vin: skribu kaj urĝe komuniku al la ambasadoro...

– Momente atendu, – oni malhaste respondis al li. – Mi invitos tradukisto.

– Mi ne povas atendi! – Innokentij bolis. (Li jam ne sukcesis ŝanĝi la voĉon.) – Kaj mi ne interparolos kun Sovetuniaj homoj! Ne kroĉu la parolilon! Temas pri la sorto de via lando. Kaj ne nur de ĝi. Aŭskultu: dum unu el la proksimaj tagoj en Nov-Jorko la Sovetunia spiono Georgij Kovalj⁷ ricevos en la radiovendejo ĉe la adreso...

– Mi ne bone kompreni vin, – la ataŝeo kviete respondis. Li certe sidis sur mola sofo, kaj neniu postkuris lin. Vigla virina voĉo aŭdiĝis en la ĉambro. – Telefonu al la ambasado of Canada, tie bone kompeni ruse.

Brulis la planko sub la piedoj de Innokentij, kaj degelis en lia mano la nigra parolilo kun peza ŝtala ĉeno. Sed eĉ unu fremdlingva vorto povus pereigi lin!

– Aŭskultu, aŭskultu! – li despere krietis. – Dum unu el la proksimaj tagoj la Sovetunia spiono Kovalj ricevos gravajn teknologiajn informojn pri produktado de atombombo en la radiovendejo...

– Kiel? Kiu avenuo? – la ataŝeo miris kaj enpenŝiĝis. – Sed kiel mi sciu, ke vi parolis veron?

– Sed ĉu vi komprenas, kion mi riskas? – vipis Innokentij.

Ŝajne, iu de ekstere frapis la vitron.

La ataŝeo silentis, eble li enspiris la cigaredan fumon.

– Atombombo? – li nefideme ripetis. – Sed kiu estas vi? Diru vian familinomon. En la aŭskultilo aŭdiĝis obtuza klako, kaj komenciĝis vata silento, sen susuroj kaj zumoj.

La telefonlineo estis disŝirita.

2. Eraro

Estas institucioj, en kiuj oni frontas ĉe iu pordo malhel-skarlatan lanternon “Por la oficistoj”. Aŭ, pli moderne, gravan spegulecan tabuleton: “Eniro kategorie malpermesita por nekoncernatoj”. Aŭ eĉ okazas, ke severa deĵoranto sidas ĉe tablo kaj kontrolas la paspermesilojn. Kaj oni imagas, ke post tiu netrairebla pordo estas io eksterordinara, kiel ĉio malpermesita.

Sed tie estas same simpla koridoro, eble iom pli pura. Meze sur la planko estas sternita tapiŝa strio el ruĝa oficeja teksaĵo. La pargeto estas laŭnorme polurita. La kraĉuoj estas starigitaj je laŭnormaj distancoj.

Nur mankas homoj. Neniu paŝas el unu pordo al aliaj.

Tiuj pordoj estas tegitaj per nigra ledο, kurbetiĝinta pro la abunda remburado, kun blankaj nitoj kaj ĉambronumeroj en spegulecaj ovaloj.

Sed eĉ tiuj, kiuj laboras en unu el tiuj ĉambroj, scias pri la okazaĵoj en la najbara ĉambro malpli multe ol pri merkataj novaĵoj el la insulo Madagaskaro.

Je la sama senfrostata malserena decembra vespero en la domo de la Moskva centra aŭtomata telefona centralo, en unu el la malpermesitaj koridoroj, en unu el tiuj sekretaj ĉambroj, kiu ĉe la domadministranto estis registrita kiel la 194a, kaj en la XIa sekcio de la 6a departemento de MGB⁸ kiel “Posteno A-1”, – deĵoris du leŭtenantoj. Ili estis vestitaj ne uniforme, sed civile por pli oportuna veno al kaj foriro el la telefoncentrala domo.

Unu muron okupis elektraj paneloj kaj signala lamparo, apud kiuj nigris plasto kaj brilis metalo de telefona-akustika aparataro. Sur unu el la aliaj muroj pendis grizpapera instrukcio kun pluraj punktoj.

Laŭ ĉi tiu instrukcio, listiganta kaj preventanta ĉiujn eblajn malregulaĵojn kaj

misojn ĉe la subaŭskultado kaj magnetofona registrado de telefonaj interparoloj de la Usona ambasado, devis deĵori du personoj: unu senĉese aŭskultu sen demeti la kapaŭskultilojn, kaj la dua nenien eliru el la ĉambro, escepte de la necesejo, kaj ĉiun duonan horon la kolegoj ŝanĝu siajn rolojn.

Ne eblis erari, laborante laŭ ĉi tiu instrukcio.

Sed pro la tragika malkongruo inter la ideala perfekteco de la ŝtataj reguloj kaj la mizera malperفتهco de la homo, ĉi-foje la instrukcio estis malobservita. Ne pro tio, ke deĵoris komencantoj, sed ĉar la deĵorantoj estis spertaj kaj sciis, ke neniam okazas io speciala. Precipe je la okcidenta Kristnasko.

Unu el ili, la larĝnaza leŭtenanto Tjugin, en la lunda politika leciono nepre estos demandita, “kiuj estas la amikoj de la popolo, kaj kiel ili batalas kontraŭ socialdemokratoj”⁹, kial en la dua kongreso necesis “disiĝi”, kaj tio estis ĝusta, en la kvina kongreso reunuiĝi, kaj ankaŭ tio estis ĝusta, kaj de la sesa kongreso denove agi dise, kaj ja ankaŭ tio estis ĝusta¹⁰. Tjugin nenial legus sabate, apenaŭ esperante memorfiksi ion, sed dimanĉe post la deĵorado li kun sia bofrato intencis fordoni sin al drinkado, kaj do la lundan matenon pro la postebrio ĉi tiu halanĝo ne povos enkapiĝi, sed la estro de la partia ĉelo jam kelkfoje riproĉis lin kaj minacis trakti lin en la kunsido de la ĉelestraro. Cetere, gravis ne respondi, sed prezenti resuman epitomon. Dum la tuta semajno Tjugin ne povis elekti la tempon por tio, kaj ankaŭ hodiaŭ li ĉiam prokrastis, do nun, petinte sian kolegon dum kelka tempo deĵori senpaŭze, li trovis oportunan lokon en angulo kaj estis skribanta en sia kajero iujn fragmentojn el la “Konciza kurso”¹¹.

Ili ankoraŭ ne sukcesis ŝalti la supran lampon. Lumis nur la lampo ĉe la magnetofonoj. La krispahara, pufmentona leŭtenanto Kulešov sidis kun la kapaŭskultiloj kaj enuis. Matene oni ankoraŭ mendis aĉetaĵojn, sed post la tagmanĝo la ambasadejo estis kvazaŭ dormanta, estis neniu telefonvoko.

Post longa sidado Kulešov decidis ekzameni la abscesojn sur sia maldekstra kruro. Tiuj abscesoj aperis kaj multiĝis pro nekonataj kaŭzoj; li ŝmiris ilin per brilanta verdaĵo, per zinkoksida kaj sulfanilamida linimentoj¹², tamen ili ne malaperis sed vastiĝis sub la eskaroj. La doloro jam ĝenis la paŝadon. Oni jam fiksitis por li konsultiĝon kun profesoro en la kliniko de MGB. Antaŭ nelonge Kulešov ricevis novan loĝejon, lia edzino estis graveda, kaj ĉi tiun bonan vivon venis la abscesoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ferioj ĉe la maro

de Ewa Grochowska



La maro estis trankvila. Ondetoj venadis al ni kaj refludis senprokraste laŭ la sama ripeta, ripoziga movo. La unua haltis ĝuste antaŭ niaj piedoj nudaj, enŝovitaj en la sablo. La dua tiklis ŝiajn maleolojn. Mi tenis ŝin ĉe la ŝultroj.

“Ne timu, vi povas iri plu je kelkaj paŝoj”, – mi diris, sentante ŝin angorplena.

Fine, nur ni du! La penso restadi sola kun ŝi multe ĝojigis min. Bonŝance, Karlo, senlabora de unu jaro, estis neatendite dungita kiel ĉefkonstruisto, do li ne povis veni kun ni. Mi deziris dorloti ŝin sen subporti kritikan rigardon de mia edzo.

“Vi tro kaŝolas ŝin. Ŝi senĉese plorgrimacas kaj vi permesas ŝin konduki vin per la nazo”, – li diris.

Plaĉis al mi ripozi ĉi tie en septembro. La plaĝo estis preskaŭ dezerta, apenaŭ kelkaj sunombreloj koloris la spacon inter la luita domo kaj la maro. En tiusezona bruejo, elektata de familioj kun infanetoj pro la maro malprofunda, nun oni aŭdis nur ondmurmurojn. La vetero estis mia aliancano: la ĉielo sennuba, la suno, kiu ne plu brulas sed karesas la haŭton. Mi malrapide reprenis la manon.

“Vidu, vi kapablas eniri la akvon sen mia helpo. La ondoj estas malaltaj, vi riskas nenion”.

Ŝi aŭdacis unu paŝon. La sekva ondo ŝprucis sur ŝiajn surojn. Ŝi ekridis laŭte. Ŝi multe ŝatis tiun plaĝejon. En la pasinteco ni ofte venis ĉi-tien. Mi rigardis ŝin tenere. La brizo malkombis ŝin kaj kelkaj hartufetoj falis sur ŝiajn okulojn. Per magriĝinta mano ŝi firme tenis sian bluan robon supre de la genuoj.

Mi revenis hejmen, tute apude, ordis la faritajn aĉetaĵojn: nutraĵojn por kvin tagoj, plurajn specojn de kukoj, skatolojn por kato kaj grandan pakon de pistukoj. Kaŝto, miaŭante, frotadis sin kontraŭ miaj kruroj. Mi neniam ŝatis la katojn, tamen mi sciis kiel ĝia ĉeesto gravas por ŝi. La aferoj orditaj, mi sidiĝis kaj observis el la teraso ŝian malgrandan, senmovan silueton. La ĉina ĉapelo aspektigis ŝin amuza kaj samtempe kortuŝa.

Subite mi aŭdis gajan bojadon. La hundo, en freneza kurado por kapti bastonon ĵetitan de ĝia mastro, impete pasis apud ŝi, revenis kaj en amika elano, lekis ŝin.

Terurita, ŝi returniĝis kaj perdis ekvilibron. Kiam mi alkuris helpi ŝin stariĝi, larmoj inundis ŝiajn vangojn.

“Pardonu min, mi malsekigis la robon”, – ŝi balbutis kulpavoĉe, kvazaŭ ŝi timus esti riproĉata.

“Ne gravas, ĝi sekiĝos rapide. Dumtempe, vi surmetos alian”.

Ŝanceliĝante, ŝi kroĉiĝis al mia brako kiel al savzono, kun la vizaĝo jam ĝojradia.

“Mi ŝatus tiun, kiun vi aĉetis por mi antaŭ nia foriro, la malvan, kun poŝoj”.

Revestita, kun haroj rekombitaj en hartuberon, ŝi helpis min senŝeligi kelkajn legomojn. Ni tagmanĝis sur la teraso. Ŝi maĉis malrapide buŝplenon da gulaŝo, ignorante la specon de la plado. Ŝia rigardo atingis horizonton de la maro ondobrila. Fore malgrandaj velŝipoj glitadis sur blua fono; proksime pasis majesta jakto, surborde juna sportisto batalis por restarigi la velon de sia veltabulo. Bedaŭrinde alfloris pasaĝerŝipo, alta kiel domego, fuŝante la pejzaĝon. Posttagmeze ŝi longe sies-tis. Apud ŝi ronronis Kaŝto. Mi observis ŝian dorman, kvietan vizaĝon kaj, kortuŝita, kliniĝis por aŭdi ŝian spiran ŝuŝadon kaj kisis flugtuŝe ŝian frunton. Atendante ŝian vekiĝon mi preparis freŝan trinkaĵon kaj ĉokoladan kukon. Dum ŝi delektiĝis per la manĝeto, ankaŭ mi retrovis guston de mia malproksima infanaĝo.

“Ĉu ni ambaŭ kantu la lulkanton pri abeloj kiuj forflugis el abelujo lasante ilian patrinon sola? Ĉu vi memoras la vortojn?”

“Junaj abeloj vekiĝas post longa, vintra dormego kaj frotas al si la okulojn per vilaj kruretoj, bzum, bzum, bzum...” Ŝi kantis kun mi malgraŭ la vortoj forfuĝintaj el ŝia memoro.

La sekvantan matenon mi starigis pentroportilon kaj preparis mian malnovan palestron, jam iomete breĉetitan. Poste mi instalis ŝin sur ĝardenan seĝon. Tamen samkiel por foti, ne estis facile pentri ŝin. Por eviti tiun tedaĵon, ŝi paŭtis, grimacis, strabis kaj mungis senĉese, do mia tasko estis peniga. Kutime mi pentras pejzaĝojn, sed mi ne volis maltrafi ŝancon portreti ŝin, do mi persistis, ke pentraĵo estu finfarita antaŭ nia reveno hejmen. Finfine, mi ĉantaĝis ŝin: “Bonvolu, ne plu moviĝi! Post unu horo ni iros al la vilaĝo kaj ni manĝos glaciaĵojn kun ŝaŭmkremo”. Frandema, ŝi obeis kaj pozis senmove.

Venontaj similaj tagoj fluis laŭ la ritmaj momentoj de niaj manĝoj kaj promenoj surborde de la maro ĝis ruĝaj rokoj. Ĉi-foje, ŝi kolektis kelkajn konkaĵojn. Vespere mi legis al ŝi ĉapitron de libro pri kastelestrino, amsopiranta je kuraĝa kavaliro, sed ofte ŝi ekdormis meze de mia legado. Mi neniam enuis kun ŝi, feliĉa havi ŝin nur por mi. Mi tiom amis ŝin!

Iom da tempo post niaj ferioj, ŝia sano difektiĝis. Dum la entombigo, pluraj personoj konsolis min dirante: “Tio estas tute natura ordo de la vivo”.

Eble ili pravis... Centjara ŝi jam estis, mia kara panjo.

Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!

18:03

de Laure Patas d'Illiers



La vetero ĝis nun estis bela. Forta vento kirlas la polvon ambaŭflanke de la vojo. La vespero estos fulmotondra. Karbokoloraj nuboj ore randitaj amasiĝas. Laŭlonge de la veturejo la arboj montras du kolorojn, okran oron ĉe unu flanko kaj malhelan verdon ĉe la alia flanko. La somero senfine finiĝas, ĝi pluas pro inerto, sen ajna energio. La filikoj rande de la vojo komencas rufiĝi. Oni ŝvitas en la peza varmo de ĉi tiu posttagmezo, tamen io neperceptebla en la aero anoncas la baldaŭan sezonon de trikaĵoj kaj koltukoj.

La ŝoforo stiras sian buson laŭ la mallarĝaj sinuaj vojoj, alten kaj malalten, monteton post monteto. En la fora oriento malofte videblas la silueto de antaŭmontoj de la Centra Masivo. Malvastas la horizonto en Quercy. La lasta vojaĝanto elbusiĝis antaŭ tri haltoj, en loko kie ĉi tiu departementa ŝoseo kruciĝas kun tera vojo al Senaillac. Per sia mano, la ŝoforo gratas sian dekstran gluteon. Sola en sia veturilo, oni senĝenas.

Li malŝatas labori dum la somero. Tristas stiri buson tute aŭ preskaŭ malplenan, dum ĉiuj estas fore feriantaj. Venu la aŭtuno kaj la brua grego da infanoj veturantaj al la lernejo, por revivigi ĉi tiun feran ujon, nun silentan kvazaŭ tombo. Tamen eĉ kiam lia buso kolektos lernejanon, tio ne plu plaĉos kiom antaŭe. Antaŭ multaj jaroj, kiam klientoj enbusiĝis, ili ĉiam diris: “Bonan tagon, sinjoro Laniès”. Nuntempe, ili ne levas la rigardon el siaj telefonoj. Eĉ per siaj damnitaj telefonoj ili pagas! Ne plu okazas donado de busbileto, kalkulo de restmono, дума babilado pri io ajn. Kiam li junaĝis, malplena aŭtobuso tutsimple ne ekzistis. Ĉiuj uzis buson, junaj kaj maljunaj, vintre kaj somere. Sed hodiaŭ onidire “ĉiu havas aŭton”. Fakte tio ne veras! Tamen tiuj, kiuj ne havas aŭton, estas devigataj elturniĝi alimaniere, ĉar pli kaj pli malmultiĝas la busoj. Ŝoforo de buso estas profesio foriranta.

La stiristo venas al la busostacidomo. La buso sekvas kurban trajektorion por lokiĝi, fronte al la kajo, ĝuste sub la afiŝita numero de la buslinio. Sinjoro Laniès peze elbusiĝas, malfaldigante siajn rigidiĝintajn kruojn, malkurbigante sian dorson. Estas neniu vivanto en la tuta stacidomo, krom senhejmulo duonkuŝanta

sur benko kun amaso da posedaĵoj surgrunde. Sinjoro Laniès ĵetas rigardon al la granda mura horloĝo. 17:58. Li disponas kvin minutojn antaŭ ol foriri, sufiĉas por pisi kaj plenigi per krano sian akvobotelon. Lia buso devas foriri je 18:03. Post dek ses haltoj, ĝi venos al la alia ekstremaĵo de la linio. Je 19:47 ĝi revenos ĉi tien laŭ inversa vojo. Tiam finiĝos lia labortago. Li eliras el la stacidomo. Neniu vojaĝanto atendas sur la kajo antaŭ lia buso. Li vespiras. Li probable laŭveturos la tutan linion sen kliento. Venontjare la busa kompanio certe forigos la lastan vojaĝon el la horaro.

18:03

Sinjoro Laniès sidiĝas, kojnumas sian akvobotelon ĉe sia seĝo, startigas la motoron. La buso skuiĝetas. Ĝuste kiam Jean-Pierre Laniès pretas retroveturi, oni frapetas ĉe lia dekstra fenestro. Li kliniĝas. Tie staras la senhejmullo, kiun li vidis sur la benko. Kion ĉi tiu volas, ĉu moneron? Ne, eniri, li volas eniri. Malvolonte, Jean-Pierre Laniès premas la butonon kiu malfermas la pordon. El sia alta seĝo kaj sia longa dorso, li subenrigardas la entrudulon kaj seke anoncas, ke biletoj ne plu aĉeteblas en la busoj mem. La vagadulo enbusiĝas kaj montras telefonon. Sur la ekrano, riparita per glubendo, afiŝiĝas rapidresponda kodo. Jean-Pierre Laniès elingigas sian pistolecen legilon kaj celas la nigra-blankan kvadraton. Nekredeble! La vagadulo estas laŭregula, lia bileto rajtigas lin veturi en ĉiuj linioj de la kompanio dum unu horo.

Ĉemane la kliento portas gitarujon el trivita kvadratita ŝtofo. Kio videblas malantaŭ li? Hundoj estas malpermesitaj en busoj, krom tiuj de blinduloj. La vojaĝanto insistas, lia hundo bone kondukas, li promesas ke ĝi ĝenos neniun, li flanken klinas sian kapon, lia rideto provas krei simpation, li pli junas, ol Jean-Pierre kredis kiam li vidis lin sur la benko. Nu, ĉar la buso nun estas malplena kaj verŝajne tiel restos... Per laca gesto Jean-Pierre permesas eniron. La vojaĝanto paŝas inter la vicoj de seĝoj. Lian dorson kaŝas granda tornistro sur kiu kuŝas rulita dormosako. Liajn kruojn iom kaŝas la sekvanta hundo.

La buso retroveturas laŭ kurba linio, antaŭeniras al la departementa ŝoseo, komencas la lastan iron kaj revenon de la tago. Dum la halto en la busostacidomo la nuboj pli malheliĝis. Proksime de la okcidenta horizonto la ĉielo konservas sian oran lumon. Ĉie alie ĝi aspektas kiel vastega griza tegmento, kaj kvazaŭ ĝiaj fostoĵ staras la poploj ambaŭflanke de la ŝoseo. La varmo, kiu amasiĝis dum la tago, stagnas en la buso. Jean-Pierre sentas kiel lia ĉemizo ĉe la dorso denove gluiĝas al la artledo de lia seĝo.


Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Viro laŭte parolanta al neniu

de Paulo Sérgio Viana



Mi bone memoras. En nia infanaĝo, sur la stratoj de nia eta landinterna urbo, inter bojantaj hundoj kaj bruemaj infanoj, foje ni vidis viron parolantan laŭte, al neniu. Li iradis ĉiam rapide, kvazaŭ urĝe, kvankam li neniam atingis sian celon. Eble tio vekis en mi simpatian, pro simileco.

Kaj mia pli aĝa frato, kun serioza, severa mieno, instruis al mi:

– Ne fidu homon, kiu voĉe parolas nur al si mem. Precipe se li parolas laŭte. Li estas freneza kaj danĝera. Ĉar kiucele iu sana homo povus paroli laŭte, se al neniu li direktas siajn vortojn?

La logika klarigo de mia frato ŝajnis al mi senkontesta. Kiel naiva povas esti logiko!

Post multaj jaroj kaj longa sencela irado, unu tagon mi troviĝis en vagono de metroo en granda urbo. En granda urbo oni ofte ricevas la impreson, ke la homamaso rapidas nenicelen. Tamen en granda urbo mallogiko jam ne aspektas naiva. Nu, mi sidis en la vagono kun libro enmane kaj ombro enkape. La trajno brue bremsiĝis, la pordoj klake malfermiĝis, kaj envenis maljunulo, kaj li sidiĝis sur la benko apud mi. Ĉiuj ceteraj sidlokoj estis okupitaj de pasaĝeroj silentemaj kaj gravmienaj.

Kaj la maljunulo komencis sian laŭtvoĉan entuziasman paroladon. Li tamen ĝin direktis al neniu; li simple parolis al la aero. Liaj larĝe malfermitaj okuloj hele brilis, kaj oni povis vidi sur ili malsekan lumon. Li parolis nur al si mem. Ŝajnis, ke li prelegas al vasta ĉeestantaro, kiu ekstaze aŭskultas, sed la pasaĝeroj en la vagono iom honte rigardis al alia punkto, jen al siaj libroj kaj gazetoj, jen al la fenestroj, jen honte unuj al aliaj. Kelkaj klopodis kaŝi sinĝenan rideton, ĉar tiel oni strange reagis, kiam oni vidas malminacitan frenezulon. Unu sinjorino zorgeme serĉis por si alian sidlokon, iom for de la homo, kiu laŭte parolis al neniu.

– Komprenu bone, miaj karaj! Mi estas feliĉa! Mi vekiĝis hodiaŭ frumatene por atendi la sunon. Mi vokis la sunon, kaj ĝi bonkore respondis. Iom post iom ankaŭ ĝi vekiĝis, pigre streĉis siajn brakojn kaj krurojn, oscedis, palpebrumis kaj fine malfermis la pordojn de la horizonto. Ĉu vi povas kredi, ke de la fenestro de mia kabanaĉo mi povas vidi la horizonton? Jes, mi povas! Jen kial mi estas feliĉa! Mi

povis vidi, ke la suno stariĝis, respondis, kaj sternis sian luman littukon sur nian mondon. Kia belaĵo! Dankon, suno! Pro tio, mi povis rimarki, ke la ĉielo estas blua, ne egoisme blua, sed blua kun lokoj rezervitaj por kotonaj nubetoj ŝvebantaj kaj kapriole saltetantaj meze de la bluo. Dankon, nuboj! Kaj mi povis vidi, ke la arboj estas pli verdaj, hodiaŭ, kaj ili spiras pli facile. Pluvo lavis kaj revigligis iliajn foliojn dum la nokto. Dankon, pluvo!

Kaj la maljunulo sinsekve dankis la pavimon de la stratoj, la fumon de la busoj, la buterpanon sur sia matenmanĝa tablo, la uniformon de policistoj, la belajn tri kolo-rojn de la semaforaj lumoj, la ĉarman vizaĝon de patrino kondukanta sian knabeton al la lernejo, la venteton de la metroaj koridoroj, la rideton de la biletkontrolisto, kaj fine la kompanion de tiuj amikaj pasaĝeroj, kiuj sidas kun li en sufiĉe komforta vagono. Kaj de tempo al tempo li ripete asertadis, ke li estas feliĉa.

Tiumomente, post lavango da dankoj, mi perceptis, ke kelkaj kunpasaĝeroj iom ĝenite sin movis sur siaj sidlokoj.

Mi ne plu rezistis la scenon. Mi proponis la manon al la entuziasma maljunulo. Li akceptis. Kaj ni senvorte premis al ni reciproke la manon, longe kaj varme. Kaj tuj poste unu junulino stariĝis de sur fronta metroseĝo kaj same proponis al li sian manon, kaj ili same longe manpremis sin reciproke. Kaj same reagis sinjorino, de sur la malantaŭa seĝo. Entute kvar pasaĝeroj ripetis mian geston. Al ĉiuj la viro, kiu parolis al neniŭ, redonis varman manpremon. Ĉiuj aliaj en la vagono honteme sin detenis, sed ne sukcesis eviti hontetan ridon. Neniŭ pasaĝero, inkluzive de mi, eldiris eĉ unu vorton.

Kaj la trajno denove bremsiĝis kaj haltis. Tiu estis mia elirpunkto. Mi eliris el la vagono, sed antaŭe mi denove rigardis tiun maljunulon, kiu laŭte plu paroladis al neniŭ, en la metroo. Kaj mi denove plonĝis en homamason, kiu rapidis kiel ĉiam. Severmienaj homoj nenien irantaj.

Ho, de kiom longa tempo mi ne vidas mian fraton!

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO



Tuta biblioteko en unu volumo
Nova eldono korektita kaj ampleksigita
199 verkoj aŭ fragmentoj de 82 aŭtoroj
Kuneldonis *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio
368 paĝoj
Prezo: 27 eŭroj
Aĉetebla ĉe UEA kaj aliaj libroservoj

Kaj la gajnanto estas...

de Wolfgang Kirschstein

Estas jam banala observo, ke nenio estas kiel antaŭe. Tio validas kompreneble ankaŭ por la ĉi-jara disdono de la Oskaraj premioj. Neniu grandskala ceremonio por gesteluloj kaj gesteluletoj, sed iom pli intima ceremonio. Nenie publika spektado kun komuna krevmaizo, sed unuopa hejma observado sur la sofo aŭ en la lito.

Usono klopodas trovi sian animon

Ĉar la grandaj kompanioj ne lanĉis multajn grandajn furoraĵojn, pli malgrandaj filmoj povis grimpi en la kategorion “plej bona filmo”. Estis frape, ke kvar el la ok kandidatoj temis pri la ebleco de alternativa Usono, alternativo al la rasista vizio de la nun forigita kaj neniam plu mencienda prezidento. Tiel *Minari* de Lee Isaac Chung rakontas, kiel korea familio trovas novan hejmon en kampara Arkansaso. *Judas kaj la nigra Mesio* (*Judas and the Black Messiah*) de Ryan Coogler rekonstruas epizodon el la movado Nigraj Panteroj. Dum la aktorado estis elstara, mi trovis la intrigon tro interna por kapti mian intereson. Sed Daniel Kaluuya prave ricevis la premion por plej bona apoga aktoro.

La proceso kontraŭ la ĉikaga-sepopo *The Trial of the Chicago 7* de Aaron Sorkin kolektis ses nomumojn, sed gajnis neniun premion. Jes, estas elstara aktora ensemblo, sed la scenaro kapablas nur fokusi al iuj el ili. La plej multaj roloj estas nur skizoj. Sorkin rerakontas la farsan proceduron el la jaro 1968a. Tiam “la sistemo” klopodis meti admonon por protestantoj kontraŭ la milito en Vjetnamio laŭ la moto “punu unun, eduku centon”. La korupteco de la jura sistemo jam estas sufiĉe ŝoka, sed Sorkin sentis la bezonon dramatigi kelkajn eventojn por pligrandigi nian indignon. Tio povas esti distra, sed ne nepre estas recepto por la plej bona filmo de la jaro.



Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nenifar': iom monotona, sed nepre atentinda albumo

Guillaume Armide. *Nenifar'*: Bitalbumo. Donneville: Vinilkosmo, 2019.



La recenzata albumo estas persona projekto de la franca esperantisto Guillaume Armide (en Esperanto – Gijom' Armide): li aŭtoris ĉiujn tekstojn kaj muzikojn, mem kantis kaj pianludis. Kompreneble, ne eblis fari la tutan laboron sole, do kelkaj pliaj personoj aranĝis la teknikan laboron (kaj eĉ pli kelkaj subtenis la tutan aferon), sed rezultis la albumo esence solista, respegulanta kaj la krea manieron de la artisto, kaj ties mondrigardon.

Nepre indas atentigi, ke la aŭtoro subtenas la ideon pri tio, ke la muziko devas esti libera; tial la tuta albumo aŭskulteblas, ekzemple, en la koncerna vikipedia paĝo (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Nenifar%27>).

Entute temas pri 14 pecoj (unu el ili estas senteksta, nurmuzika). La plimulto uzas nur pianan akompanon kaj unuvoĉan kantadon; nur en du pecoj kromaperas fluto, en unu plia – drum-partio; sporade sonas kelkvoĉa kantado (plenumata de la aŭtoro mem). La dominantan ĝenron de la kantoj oni eble povus nomi “balado”, tamen temas pri baladoj sufiĉe intimaj kaj kun iom da fantazio kaj eĉ mistikemo. La diskreta malriĉeco de la instrumenta partio faras bonan impreson pri “viva prezentado”, la voĉo de la aŭtoro estas tre agrabla, la prononco tre klaras kaj (krom nur unuopaj misetoj) preskaŭ perfektas.

La pli multaj tekstoj temas pri personaj sentoj kaj intimaj psikaj travivaĵoj. Certes, temas ankaŭ pri la amo, sed kun iom novaj (almenaŭ por mi, se temas pri la Esperanta muziko) akcentoj: foje malkaŝe sonas la ideoj de pluramemo (samtempa amrilatado kun pluraj personoj) kaj “sekse neklasikaj” amligoj. Tiujn ne tro kutimajn temojn subtenas ankaŭ la uzo de la “genre neŭtrala triapersona” pronomo *ri*, kiun la aŭtoro tamen uzas iom ŝpare kaj, fakte, nur lige al la prezentata temaro (ne temas do pri “senbrida riismo”, la menciita pronomo aperas nur en tri tekstoj, eblas rigardi ĝin nur arta rimedo). Iom apartas la kantoj *La plej granda* (unuavide – apologio de feminismo, sed komprenate pli vaste ĝi prezentas brilan satiron pri la nuntempaj politiko kaj socio: “Malnovas tiu mondo, kie venkas la plej granda *aco”, la asteriske prezentitan literon divenu mem) kaj *La fabela rakonto pri milda Dudu...* (kiu prezentas iom naivan, sed ja kortuŝan fabelon pri la plibonigo de la mondo; la refreno de tiu kanto estas eble la plej bela kaj kulmina parto de la tuta albumo). Troveblas trafaj kaj impresaj pensigaĵoj, kiel “Vi kredas, ke vi estas via menso; tio estas iluzio, la ilo [la menso] kaperis vin” (ĉi-foje, fakte, temas pri la ideoj de Eckhart Tolle, iom fama mens-trejnistoj) aŭ “Se okazas, ke mia nudec’ estas al vi malomaĝo, [do] ne admonu min al pli da dec’: daŭre vastas la pejzaĝo”.

Lingve la tekstoj estas verkitaj en sufiĉe bona kaj eĉ freŝa Esperanto; multas vortokreaĵoj (ekzemple, “nereĝojgeblulo”, “morgaŭen”) kaj atentokaptaj metaforoj (ekzemple, “milda kiel parasaurololo”); evidentaj eraroj nur kelkas. Tamen versteknike la tekstoj estas iom krudaj: la aŭtoro preskaŭ ĉiam zorgis fari bonajn rimojn, sed la plimulto de la tekstoj estis verkitaj per tre varia metro. La metrovarieco estas neniel malbona per si mem; sed agacas, ke eĉ ĝi ne sukcesis savi la aŭtoron kontraŭ la mislokigitaj akcentoj (ja iom mildigataj per la liber-ritma kantado, sed klare sentataj); multaj rimoj estas “ŝiritaj” (rimiĝas nur iuj vorto-partoj, kiuj apartenas al diversaj versaj kaj muzikaj linioj). Iomaj deflankiĝoj de la klasikaj kutimoj ja povas impresi kiel “siaspeca spico”, sed tro da spico malutilos al ĉiu plado. Mi sincere aplaŭdas la poeziajn sentojn kaj strebojn de la aŭtoro, tamen ne povas eviti la kritikon de la verstekniko; la troabundo da licencoj ja rompas la tutan sistemon, dum ne temas pri la kreo de io principe nova.

La muziko de la kantoj estas sufiĉe bela kaj varia, eĉ malgraŭ la instrumenta malriĉeco. La pianaj aranĝoj estas diversaj ritme kaj akompane, kvankam kelkfoje aŭdeblas ioma “malpleneco” de la harmonioj (“malplenaj” kvintoj sen apogo de la akord-fara trito). Ege bedaŭrindas, ke tra la tuta albumo superregas iom deprima minoro, kiu faras la tutan “vivan prezenton” (eĉ se perfekte realigitan de la teknika vidpunkto) melankolie monotona: ĉiu aparta kanto sonas pli-malpli interese, sed la sonado de pli-ol-hora minoro iom malfaciligas la digeston de la albumo.

Resume: malgraŭ ĉiuj miaj kritikoj la albumo estas tutcerte atentinda: pro iom nekutima sincereco (kaj muzika, kaj teksta), pro la freŝa lingvaĵo, pro iom nebanala temaro. La albumo certe pli impresos la junularon, ol la “malnovskolanojn”. Estos ege interese observi la pluan kreaĵon evoluon de la artisto, kiu post ioma laboreto pri la pure teknikaj aferoj ja povus, laŭ mia opinio, iĝi vera stelulo de nia Esperanto-mondo.

Paŭlo Moĵajevo

Vinilkosmo lanĉis la bitan unuopaĵon *Mozaiko de Kjara*

La 14an de aprilo Vinilkosmo lanĉis la bitan unuopaĵon *Mozaiko de Kjara*. *Mozaiko* estas nova kanzono de Kjara (Chiara Raggi), tradukita/adaptita en Esperanto de Federico Gobbo. Ĝi aperis du jarojn post ŝia unua Esperanta albumo *Blua Horizonto* je la datreveno de la forpaso de Ludoviko Zamenhof.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Rondaj nombroj subkomprenigas retrorigardon por resumi la faritan laboron kaj tiri konkludojn. Tion ja faris Ulrich Becker, kompilinte kaj komentariinte la statistikon pri du dudekoj da kajeroj de la *Beletra Almanako*. Evidente kreskis kvanto da publikigaĵoj kun la ioma paĝokresko de 3000 al 3140. Grave pliiĝis kvanto da prozaĵoj – originalaj (je ĉ. duono) kaj tradukaj (duoble), same traduka poezio nombre duobliĝis. Da originalaj poemoj estas eĉ iomete malpli. Ĉu la menciita kresko okazis pro reduktiĝo de la aliaj rubrikaj? Ĉagrenas falo de la kvanto da aperintaj rezenzoj – de 136 en la unua dudeko da kajeroj al 95 en la ĵus fermita dua dudeko. La eldonisto sciigis ankaŭ nomojn de la verko-ĉampionoj – jen la trio kun la plej multaj kontribuoj – Jorge Camacho kun 51, Sten Johansson – 31; István Ertl – 28...

La prozan fakon de BA malfermas mallonga ĉapitro “Mia Vojaĝo” el *La longa vojaĝo*, en kiu Eddy Raats rakontas la teruran vojaĝon, kiun la eta Eddy, kvarjaraĝa kaj tute sola, devis fari en trajno de Belgio al Svislando dum la dua mondmilito. La aŭtoro estas montgrimpisto, skiinstruisto, muzikisto kaj esperantisto, forpasinta en decembro 2020.

En la rakonto *Sputnik* de Sten Johansson disvolviĝas historio de lernejana amikeco sub estreco de la latva enmigrinto fortulo Janis, kies petolaĵoj fine kondukis al la tragika finalo. Pri la mirinda knabino Hypatia, kiu pli bone konis la surfacon de la Luno, ol la geografion de la Tero, rakontas Massimo Acciai Baggiani en *La lunaj mapoj*, pri ŝia revo veturi sur la luna surfaco per speciala veturilo inventita de ŝi.

Sekvas ses atentokaptaj miniaturaj rakontoj de Anina Stecay kaj aliaj prozaĵoj de niaj verkistoj.

En 2020 la 10a literatura konkurso de Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki kaj Bjalistoka Esperanto-Societo havis la aktualegan koronavirusan temon “Esperanto ligas homojn. Pandemio – neĉiutaga ĉiutageco”. Kvankam la konkursaĵoj aperis libroforme, du el ili estas republikigitaj en BA – de Elżbieta Karczewska kaj de Sara Spanò.

Originala poezio estas prezentita per tri poemoj de Božidar Brezinščak Bagola. Varias tradukita poezio reprezentita per la nomoj de Ari Jósefsson (islanda), Esther Schor (usonangla), José de Espronceda (hispana), Heinz Kahlau (germana), Nachoem M. Wijnberg (nederlanda), Pedro Sáez Serrano (hispana), Antoine Cassar (kvankam malta poeto, sed traduko el la angla, franca kaj germana versioj).

Ampleksas la fako de tradukita prozo. Ne surprizas la elekto de Giulio Cappa – *Mia onklo malkovras la ekziston de fremdaj lingvoj* de Gianni Celati. Volonte mi legus pliajn erojn de ĉi tiu verkisto.



La novelo *Ĉevalo de Karamsin* (trad. Sten Johansson) de la finnlanda svedlingva verkisto Runar Schildt aperis en 1919, unu jaron post la interna milito en Finnlando. Ĝi ne traktas rekte la militon, sed la tono de la rakontado estas tre morna. La tuta vivo de Wilenius turniĝas ĉirkaŭ lia simpla metio kaj la sindonemo al sia edzino. Sed Edla, lia edzino, mortis kaj li restis soleca kun ŝia korpo izolita aĝe kaj lingve de siaj najbaroj en multloĝeja domo en Helsinko. Malespere Wilenius vagadas tra la vintraj stratoj kaj fine revenas al sia domo: “Jen alte en la plej supra etaĝo, trans unu el la multaj mallumaj fenestroj, kuŝas la mortinta Edla. Jen atendas lin ankaŭ io alia: la morgaŭo sen helpo kaj apogo, sen laborkamarado, sen kuirantino, sen lavistino, sen ĉio, kion lia kompatinda cerbo ne plu povas memori en siaj laceco kaj humiligo”. Ne tolerante solecon Wilenius serĉas amikecon ĉe stratulinoj, kiuj luprenas ĉambron en la sama domo. Konsolas lin la penso, ke li kaj lia edzino ricevis sofon por ripari kaj Edla ne devis morti surplanke. Rezigninte pri siaj lastaj fierajĝoj, li pensas pri sia propra estonteco ĉe la malriĉulejo kaj tiu “nova decido karesis lian animon kiel certeco pri profunda, tre profunda ripozo”.

En la rakonto de Carlo Menzinger di Preussenthal *Irenoj kaj ranoj* (trad. Massimo Acciai Baggiani) ni mergiĝas en la imagitan mondon, kia ĝi estus se Sparto gajnus la batalon de Leŭkro en 371 a.K. Mondo en kiu la militemo kaj krueleco de la Sparta Imperio superregas la popolojn. Edmund Grimley Evans enkondukas sian tradukon de *Valeriano* de la Fratoj Grimm, faritan en la stilo de Kabe, preskaŭ detektivece pri kio estas “Rapunzel” kaj la aliaj nuancoj ligitaj al la verkoj de la Fratoj Grimm kaj sia traduklaboro.

Christian Cimpa en “Por montri nian *duan* kostumon” montras vere konvinkajn ekzemplojn, en kiuj nacilingvaj verkistoj/tradukistoj prezentas nian kulturon al la “ekstera mondo” en plej pozitiva, alloga maniero. Araceli Pulpillo artikolas, i.a. pri la tri modelaj intelektaj virinoj, kiuj kontribuis komence de la 20a jarcento al anarkiisma *La Revista Blanca*. Giulio Cappa verkis postparolon por la hispanlingva poemaro *Quemadura*, enhavanta poemojn verkitajn de Jorge Camacho dum la lastaj tridek jaroj. Ĝi ne aperis en la libro kaj premieras en ĉi tiu BA en la Esperanta originalo. Tuj sekvas intervjuo kun Jorge Camacho, kiun faris István Ertl en oktobro 2019.

Jen plia apero de Camacho, jam kiel recenzanto pri la dulingva, kataluna kaj esperanta, *Cementiri de Sinera. Tombejo de Sinera* de Salvador Espriu (trad. Gabriel Mora i Arana). Mao Zifu recenzas pri *Juna amserĉado per Esperanto* de Vanege, kaj Anna Löwenstein pri *Paulus fondinto* de Trevor Steele.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humoristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

Ridu kune ni!

Lerni ne nur koresponde

Fraŭlo decidis finfine edziĝi. Li konatiĝis kun bela, kvankam ne tre juna virino kaj aranĝis festenon okaze de la fianĉiĝo. Dum la vespero venis al li malnova amiko kaj iom hezite klarigis: “Via ino estas ĉarma, sed ĉu vi scias, ke duono da viroj en tiu ĉi urbo jam konas ŝin tre intime?”

Post la foriro de la gastoj, la fianĉino rimarkis ke ŝia estonta edzo estas malĝoja kaj demandis lin pri la kialo, Li rakontis, kaj sekvis jena dialogo:

- Kara, pripensu ĉion racie. Ĉu vi ne ŝatas, kiel mi faras koktelojn?
- Vi faras tion bonege!
- Ĉu vi ne ŝatas, kiel mi akceptas gastojn?
- Vi scias aranĝi belegan festenon!
- Bone, eble vi ne ŝatas, kiel mi amoras?
- Ho, vi estas plej lerta amorantino!
- Sed ĉu vi pensas, ke mi lernis ĉion ĉi en korespondaj kursoj?

Enspeziga feriado

Virino gajnis ferion loterie kaj unuafoje sola vojaĝis por ferii ĉe maro. Reveninte hejmen, ŝi prezentis al sia edzo ne nur la netuŝitan monrezervon, sed ankaŭ stakon da bankbiletoj.

- 2000 eŭroj! – ŝi fiere deklaris.
- Sed kiel vi kolektis tiom da mono?
- Viroj donacis al mi pro miaj etaj petolaĵoj.
- Ĉu vere? Mi ne donus al vi pli ol dek eŭrojn...
- Kaj mi ne petis pli multe!

Ho, tiuj serpentoj

Unu serpento demandas la alian:

- Ĉu mi estas tre venena?
- Jes. Sed kial vi interesiĝas?
- Mi hazarde mordetis mian langon.

Tro nova kaj nefidinda

Rifuzanto de vakcinoj haltas antaŭ nova ponto super rivero, en kiu svarmas krokodiloj, por demandi la gardiston:

- Ĉu vi povas centprocente garantii, ke ĉi tiu ponto ne falos, kiam mi estos sur ĝi?
- Ne, neniuj povus garantii ion centprocente, sed sendube temas pri 99-procenta garantio.
- Ho ne, prefere mi naĝu, ja la ponto estas tro nova kaj nefidinda.

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Polpa pozo

Hannah turnas sin al Jonas, prenas liajn suprajn brakojn... prenas lian amorilon kaj enkondukas ĝin en sin. (Lode Van de Velde. *Aspiroj. Kroniko de neanoncita murdo*. [Ant-verpeno]: Eldonejo Libera, 2020, p. 123)

Ofendo de majesto: la Civito malfruas je unu monarko

Eksterordinara subvencio de la nederlanda reĝino dampis la kostojn de la personaro... (*Magrigo terapio apenaŭ reduktis la administran pezon*, <https://www.esperantio.net/index.php?id=4324>; rimarkis Ionel Oneț)

Kiom da senkonsciaj? aŭ: Amas-kunsveno

La kvanto de konsciaj esperantistoj preskaŭ falis al la nivelo de la iama Revela Esperantista Grupo. (*Esperanto-movado en landoj de Eŭropa Unio ĉirkaŭ la jaro 2010* / Red. Zlatko Tišljar. Bruselo: Eŭropa Esperanto-Unio, 2013, p. 38, <https://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=413&filename=euro-po-e-movado.pdf>)

Bruaj bandoj iĝas varoj

Por aldoni en via retejo la varbrubandon... kopiu la HTML kodon ĉi sube kaj gluu ĝin en vian retejon aŭ blogon (<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/201-oficiala-aper-de-la-nova-albumo-de-i-d-c-fulmerford.html>; rimarkis Kalle Kniivilä)

Povis erari

Komence de Aŭgusto, la epidemio estos malperita (mi povas erari... (<https://www.liberafolio.org/2020/04/04/uea-nuligos-la-ci-jaran-universalan-kongreson/#comment-4173>))

Korespondi deziris

Ŝi konfesis ke poŝte ŝi pli bone observis min (Imre Kertész. *Sensorteco* / Trad. István Ertl. Novjorko: Mondial, 2018, p. 39; trovis Brian Moon)

Alloga ŝnurdancado?

Tial la rakontado, ĝuste pro sia naiveco, estas alloga, alt-ira ĝis la fino. (Carlo Minnaja. *Longa impulsa vivo* // *Monato*, 2021, №4, p. 28)

Okulvitroj malaperitivaj

Faritaj el vitro, la okulvitroj havas aŭdacan bulbon-forman silueton kun delikate ekflamita buŝo, perfekta por trinki likvoron post la vespermanĝo. (<https://www.hushhush.com/eo/home-decor/tabletop/glasses-drinkware/glassware-sets/set-of-6-liqueur-glasses-by-creart>)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarett 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>